

1980 februaro

73-a jaro

n-ro 890(2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

V-4252/73 (1980)



Nun funkcias
propra oficejo de la Asocio
en la monda metropolo

UEA havas novan Statuton

Vi trovos

ke la poŝtisto finfine alportis ĉi tiun revunumeron. Damne, tio daŭris tiel longe ĉi-foje. Ne elstarigeblas aparta kaŭzo eĉ. Simple: iuj numeroj kunmetiĝas facile, kun aliaj tio ne okazas. Vi scias ja, en revuo kies subtitolo tekstas "oficiala organo de..." necesas pesi ĉiun vorton, ĉar oni pretas por neniaj pardonoj, oni prave atendas, rajte postulas ktp. Cetere, kiam gastoj vizitas la Centran Oficejon, montrante al ili la redakcian ĉambron ni kutimas diri: "Jen la revua kuirejo". Efektive, tie oni ja senseligas tekstojn, fritas proponojn, tranĉas artikolajn salataĵojn, stufas ideojn, raspas bibliografiajn informojn, knedas recenzojn, muelas novaĵojn kaj ĉion poste ornamas per titola kremo. Tiel estiĝas via monata movada menuo. La kvar februaraj ĉefpladoj estas la tekstoj pri Nov-Jorko (p. 22), pri lingvosciencistoj (p. 24), pri virinoj (p. 26) kaj pri TEJO-aranĝoj (p. 34). La deserto estas la teksto pri Finnlando (p. 28); kiel vino servu la bonaj rezultoj de la Ĝenerala Voĉdono (p. 21). Do, havu bonan apetiton! Dume, pensu pri la malplena kaso de la Fondaĵo Azio-Afriko (p. 23) kaj klopodu rezigni pri kukopeco favore al ĝi. Antaŭdankon!

Enhavo

- 21 Ĝenerala Voĉdono: Granda plimulto por la Statuto; Alvoko: Elekto de komitatanoj "B"
- 22 Nov-Jorka Oficejo de UEA: Propra sidejo en la mondurbego
- 23 Unuiĝintaj Nacioj: Sukceso en Barcelono estis pli granda (H. Tonkin); Fondaĵo Azio-Afriko: Malplenas la kaso (Renato Corsetti); D-ro Tonkin havas novan adreson
- 24 Lingvo kaj mondo: Kial Esperanto ne interesas lingvosciencistojn? (Probal Daŝgupto)
- 26 Aspektoj de la kongresa ĉeftemo por Stokholmo: Virinoj — ŝanĝoj necesas en la tuta socio (Centro de UN por Socia Evoluo kaj Humanaj Aferoj); Periodaĵoj: "Monato" estas, EPĈ fariĝas bela (S. Milojević)
- 28 Okaze de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Skizo pri finnoj kaj ilia lando (Jouko kaj Tuula Lindstedt)
- 30 Kongresoj tutamerika kaj pacifika; Tria konferenco okazos
Recenzoj: "La fenomeno Svislando" (Renato Corsetti); "Retoj" (Vladimir Samodaj); "V. Damjanov kantas en Esperanto" (David Hill); "Esperanto in Rubrieken" (R. de Jong); "Kara diablino" (Aldo de' Giorgi)
- 33 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 34 TEJO-paĝo: 23a Internacia Seminario de GEJ: Eŭropo kaj Tria Mondo (Ian Jackson); Festivalo por mezaĝuloj (P. Peeraerts); TEJO en Nairobi
- 35 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 37 Nekrologoj (R. Carlén, J. Kozlevčar, O.C. Lange, L. Moker);
Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 38 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 39 Anoncetoj
- 40 Esperanto en radio — kompleta tabelo (Georges Larglantier)

La kovrilo

Kial subite Nov-Jorko sur la kovrilo? Ni faras la demandon antaŭ ol lasi al vi eblecon starigi ĝin. Nu, ĝenerale, kial ne Nov-Jorko sur la kovrilo? Parizo ja estas Parizo, sed ĝi sonas emfaze france; Londono insistas resti akcentite angla, Tokio eĉ ne klopodas maljapaniĝi, Rio komfortas en sia brazila karnavaleco, Romo bruas itale, Kairo etosas arabe, Pekino — supozeble — pulsas ĉine, Sidnejo ehas mondorande, Moskvo kantas memsufiĉe. . . El ĉiuj mondurboj Nov-Jorko estas la plej monda, inter la usonaj ĝi estas la malplej usona. Delonge jam Nov-Jorko estas pulso de la mondo. En tiu monda metropolo nun ankaŭ UEA havas sian ankrolokon (vidu la paĝon 22). La Nov-Jorka Oficejo de UEA troviĝas en tiu malalteta domo, maldekstre, tuj post la kupolo de la blanka konstruaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, ĉio ĉi unuaplane, sube, centre de la kovrila foto. Ankaŭ tial, do, Nov-Jorko sur nia februara kovrilo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj eksteraj rilatoj: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 243-6827.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Granda plimulto por la Statuto

Post ampleksa kaj plurfoja pritrakto en la Komitato kaj en komisionoj, post larĝa diskuto inter la membraro (iniciatita per la publikigo de kompleta statutprojekto en nia revuo de decembro 1978), post tre funda analizo de la ricevitaĵoj komentoj, post lucernaj komitataj amendoj kaj voĉdono pri ĉiu unuopa paragrafo, kaj — fine — post la Ĝenerala Voĉdono de la tuta membraro, Universala Esperanto-Asocio nun havas novan Statuton. Se el tridek unu mil membroj (precizajn nombrojn vidu ĉi-sube) pri ĉiuj paragrafoj jese voĉdonas inter dudek sep kaj dudek ok mil membroj, tio ja estas grandega plimulto kaj tio signifas, ke la nova baza dokumento de la Asocio estas forta esprimo de la kolektiva volo de la membraro, same kiel ĝi estas grava kaj mejloŝtona rezulto de plurjara kolektiva laboro.

INTER la 11a de oktobro kaj la 11a de januaro okazis Ĝenerala Voĉdono pri la nova Statuto de UEA, pasintjare aprobita de la Komitato de UEA en Lucerno. La Voĉdonon, por kiu validis la reguloj de la malnova Statuto, rajtis partopreni la aliĝintaj landaj asocioj kaj — en tiuj landoj, kie ne ekzistas aliĝinta landa asocio — la individuaj membroj. La rezulto estas, ke ĉiuj paragrafoj de la nova Statuto estas akceptitaj per granda plimulto de la voĉoj.

La maksimuma nombro de eblaj voĉoj estis 31 190.

La nombro de voĉoj esprimitaj estis 25 272. La komi-

siono por nombrado de la voĉoj kalkulis la voĉojn pri ĉiu aparta paragrafo. La nombro de jesaj voĉoj variis inter 23 979 kaj 25 271. (Post la limdato, do tro malfrue, alvenis ankoraŭ 3 441 voĉoj — ĉiuj jesaj.)

Unu landa asocio voĉdonis kontraŭ la paragrafoj 5 (Neŭtraleco), 13 (Landaj asocioj), 15 (Kontraktoj kun Esperanto-asocioj), 16 (Kontraktoj kun neesperantaj organizaĵoj) kaj 21 (Reguloj pri ĉefdelegitoj ktp.). Unu alia landa asocio voĉdonis kontraŭ la par. 24 (Komitatanoj B).

La nova Statuto estas intertempe jam kompostita kaj aperos en Jarlibro 1980, kiun ricevos ĉiuj individuaj membroj. Post tio ĝi estos ricevebla en la formo de aparta broŝureto. Komisiono de la Komitato nun prilaboras la revizion de la Ĝenerala Regularo.

Alvoko: Elektado de komitatanoj B

EN 1980 okazos nova elekto de ĉiuj komitatanoj. Ĝis nun, la komitatanojn "B" rajtis proponi kaj elekti nur la ĉefdelegitoj kaj delegitoj. Laŭ la nova Statuto, tiujn rajtojn ricevis **ĉiuj individuaj membroj de UEA**. La nombro de komitatanoj "B" ĉi-jare elekteblaj fare de la individuaj membroj estas: **sep** (konforme al la par. 24 de la nova Statuto).

Rezulte de la akcepto de la nova Statuto, samtempe ekvalidis kelkaj ŝanĝoj en la Ĝenerala Regularo, kiujn jam anticipe akceptis la Komitato de UEA en siaj kunsidoj en Lucerno. La ŝanĝoj koncernas nur la paragrafojn 28 (modifita) kaj 30 (forstrekita) de la Regularo kaj celas konformigi la regulojn al la preskriboj de la nova Statuto, precipe rilate al la komitatanoj "B".

Laŭ la novaj reguloj, po dek individuaj membroj el almenaŭ tri diversaj landoj rajtas proponi nur unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150



La nova Statuto de UEA donas pli da rajtoj al la individuaj membroj de la Asocio

vortojn. Kandidatigoj, kompletaj laŭ la ĉi-supraj preskriboj, devas atingi la Centran Oficejon en Rotterdamb antaŭ la 30a de aprilo 1980.

Se la nombro de validaj kandidatoj ne estos pli ol sep, ili ĉiuj estos konsiderataj kiel elektitaj. Se la kandidatoj estos pli multaj, voĉdonilo estos sendita al ĉiu individua membro en majo.

La Statuto cetere difinas, ke komitatano devas esti individua membro de UEA dum la du jaroj antaŭ la elekto kaj resti individua membro tra la tuta oficperiodo. Ĉiuj komitatanoj estas reelekteblaj. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano.

NOV-JORKA OFICEJO DE UEA:

Propra sidejo en la mondurbego

KIEL ANTAŬVIDITE en nia decembra numero (p. 205), oni ja inaŭguris la novan oficejon de UEA vid-al-vid de la Sekretariato de UN en Nov-Jorko. Dum preskaŭ la tuta tago, la 13an de decembro, oni bonvenigis en tiu oficejo gastojn el la Sekretariato de UN kaj el Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO). Inter ili troviĝis d-ro Robert Muller (sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN), kiu festparolis dum la UK en Lucerno. Proksimajn rilatojn de UEA kun aliaj NRO-oj nun aparte stimulas la kapabloj kaj personaj kontaktoj de s-ino Jackie McAloon, kiu estras tiun novan oficejon de la Asocio. S-ino McAloon havas deklaran sperton kiel NRO-representanto. Precipe pro sesjara ligiteco kun la Ligo de Voĉdonantinoj de Usono (kiun ŝi tiam reprezentis ĉe UN), ŝi havas ankaŭ fundan konon de la landa jura-politika kaj ekonomia problemaro, kio faciligas trovi komunajn bazojn por kunlaboro inter UEA kaj NRO-oj surloke aktivaj kontraŭ diversaj formoj de diskriminacio.


Du tagojn post la inaŭguro de la Nov-Jorka Oficejo de UEA — kvazaŭ por plivarmigi la ejon — oni festis Zamenhof-Tagon en la sama domo. Partoprenis la loka Esperanto-societo kaj anoj de diversaj Esperanto-kursoj en la ĉirkaŭaĵo — entute kvindek da homoj, inkluzive la infanojn, kiuj prezentis pup-teatraĵon. D-ro Humphrey Tonkin mallonge klarigis pri la agado de UEA ĉe UN. Jam delonge la UEA-laborgrupo en Nov-Jorko, kiu okupiĝas pri informado al la UN-rondoj kaj pri flegado de necesaj rilatoj kun la naciaj delegacioj ĉe UN kaj kun la NRO-oj, sentis forte la mankon de taŭga ejo por intensigi kaj konstantigi la efikojn de sia laboro. Nun, havante fizikan bazon por firma laboro, la nov-jorkanoj agantaj por UEA havos pli da ebleco enpenetri kaj ekinflui la etoson inter NRO-representantoj, diversnaciaj delegacioj kaj sekretariaj oficistoj same diversnaciaj. D-ro Tonkin denove prelegis post kelkaj tagoj dum la Zamenhof-vespero de la Nov-Jorka Esperanto-Socie-

to. Ankaŭ nin mem en la Movado oni bezonas daŭre rekonvinki pri la urĝeco kaj neceso de la agado ĉe internaciaj instancoj.

La malfermon de la nova oficejo de UEA apogis i.a. multaj unuopuloj per la ofero kutima en la Movado. Ni aparte menciuj Germaine Wolff (Belgio), Betty Salt (Kanado), Armin F. Doneis, Francis E. Helmuth, Daniel L. Mason kaj William F. Harmon (ĉiuj el Usono), kiuj fariĝis patronaj membroj de nova grupo, kiu nomiĝas "Amikoj de la Nov-Jorka Oficejo". Krome, la Nov-Jorka Oficejo organizas Esperanto-kurson en la Sekretariato de UN kaj klopodas mem iom financi sian agadon. Almenaŭ en la komenco, la ĉefan financon ŝarĝon pri la Nov-Jorka Oficejo transprenis la Propaganda Konto de UEA, kies celo estas financi similajn agadojn ankaŭ en aliaj medioj kaj — precipe — en landoj sen organizita Esperanto-movado. La adreso de la Nov-Jorka Oficejo estas: Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, 7th Floor, New York, N.Y. 10017, Usono.

La starigo de la Nov-Jorka Oficejo de UEA devus marki gravan etapon en la evoluo de la Asocio. Tiu etapo komenciĝis jam antaŭ pluraj jaroj, kaj la nov-jorka sidejo fariĝas kvazaŭ ia fizika pruvo pri ĝi. Ju pli la informa agado pri Esperanto disvastiĝas en novaj kaj gravaj medioj, des pli necesas atente plani kaj kunordigi tiun disvastiĝon. La kreiĝo de la oficejo en Nov-Jorko celas respondi al unu el tiaj postuloj.

Foto: Unuiĝintaj Nacioj



La impona konstruaĵo de la Sekretariato de UN en Nov-Jorko: UEA-oficejo troviĝas je kelkcentmetra distanco.

Sukceso en Barcelono estis pli granda

MI DEZIRAS kompletigi la informon, kiu aperis en la januara numero (p. 17) de la revuo. Temas pri la novaĵo, ke la 27a Konferenco de la Monda Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj akceptis rezolucion apogan al Esperanto.

Kio levas tiun rezolucion super la nivelon de pliaj bonaĵoj sen realaj rezultoj estas la fakto, ke proponis ĝin ne la nov-zelanda filio de la Federacio sed la Estraro de la Federacio mem. Do, ne temas pri klopodo de iu elemento en la organizaĵo redirekti ĝiajn energiojn al Esperanto, sed decido flanke de la gvidantaro mem, ke ĝi deziras okupiĝi pri Esperanto kaj pri kunlaboro kun Esperanto-asocioj.

La kontaktoj kun la Federacio komenciĝis jam antaŭ kelkaj jaroj, kiam ties prezidanto, prof. Mihály Simai, intervjuiĝis de *Hungara vivo* kaj esprimis pozitivan opinion pri Esperanto kaj la bezono de internacia lingvo. Estas vere, ke la nov-zelanda asocio ĉefrolis en la kultivado de bonaj rilatoj inter la Esperanto-movado kaj la Federacio, sed lastatempe la Estraro mem komencis esplori la meritojn de Esperanto.

Mi mem interparolis kun la Ĝenerala Sekretario de la Federacio, s-ro Frank Field, en Ĝenevo antaŭ unu



UEA-delegacianoj en Barcelono: Joan Guñón i Roset (maldekstre) kaj Llibert Puig i Gandia (meze). Dekstre estas Franceso Ibañez i García de la Hispana UN-Asocio.

jaro. Rezulte, li decidis viziti nian kongreson en Lucerno (kie li partoprenis en unu el la podiaj diskutoj), kaj ankaŭ tie okazis interparoloj inter li kaj gvidantoj de UEA.

Nun necesas plenumi la menciitan rezolucion. Tiucele nun okazas pliaj traktoj inter UEA kaj la Federacio. Aktivuloj pri eksteraj rilatoj en niaj landaj asocioj baldaŭ ricevos precizajn sugestojn tiucele.

La sukceso en Barcelono estas por UEA kaj Esperanto vere signifa. Nun ni devas montri, ke la Esperanto-movado povas praktike kunlabori kun la Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj.

Humphrey Tonkin

FONDAĴO AZIO-AFRIKO:

Malplenas la kaso

LA LEGANTOJ de ĉi tiu revuo rimarkis, tre verŝajne kun kontento, ke en la novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA kuraĝiga frazo bildigas la situacion de Esperanto en evolulandoj: "... novaj moviĝoj de intereso animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo".

Tiun intereson akompanas agado de kelkaj funkciuloj de la Asocio kaj de la Centra Oficejo, kio estas ne multe konata de la esperantlingva publiko en pagi-povaj landoj kaj kion ni povas kun fiero nomi "rutina" laboro. Temas pri daŭra korespondado kun komencantaj esperantistoj en Azio, Afriko kaj Latina Ameriko, pri produktado de materialoj por ili, pri sendado de lernolibroj, pri invitado de tiuj homoj al Universalaj Kongresoj.

Ne necesas klarigi, ke la bazo de tiu tuta agado estas financaj rimedoj. Ili venas de sindonaj membroj konvinkitaj pri la neceso tutmondi Esperanton. Multaj ĝis nun donacis grandajn kaj malgrandajn sumojn, tiel por difinitaj projektoj, kiel por la ĝeneralaj celoj de la Fondaĵo Azio-Afriko. Bone konata japana anonimulo eĉ aranĝis kampanjon por replenigi la nuntempe mal-

plenan kason (ĝi malpleniĝis interalie pro la produktado de ŝuahillingva informabroŝuro).

Se vi deziras ke la centjaran datrevenon de nia lingvo oni festu en ĉiuj mondopartoj, la Fondaĵo Azio-Afriko estas la ilo. La adreson kaj kontonumerojn de UEA vi ja scias aŭ povas trovi ilin dorse de la kovrilpaĝo en ĉi tiu numero. Antaŭdankon!

Renato Corsetti,
komisiito pri Regiona Agado

D-ro Tonkin havas novan adreson

D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, meze de januaro ĉi-jare ŝanĝis siajn privatajn adreson kaj telefonnumeron. La nova adreso estas: D-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono. Korespondaĵoj jam ekspeditaj al la malnova adreso tamen atingos la prezidanton. La telefonnumero de la akceptejo, kiu estas ligita al la telefono de d-ro Tonkin, estas (215) 243 6827; rekta numero estas anoncota. Ekde nun bonvolu uzi nur la ĉi-supran adreson.

Kial Esperanto ne interesas lingvosciencistojn ?

En "Transoceana", revuo de Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto (n-ro 3/1979), ni trovis la sekvan artikolon en iom mallongigita formo. Laŭ nia peto, la aŭtoro, Probal Daŝgupto, disponigis al ni la originan manuskripton. Simile al aliaj tekstoj de Daŝgupto, ĉeestas ankaŭ ĉi tie kelkaj "probalismoj". Ne timu de tiuj pajlohomoj en grenkampo. Ili facile digesteblas. La du gravaj kvalitoj de la teksto estas: 1) skizo pri la ĉi-jarcenta lingvosciencia evoluo; 2) demando pri nova monda lingvosciencia ordo.

ESPERANTISTOJ, kiuj iel ajn intertraktis kun profesiaj lingvosciencistoj, rimarkis, ke tiujn ĉi Esperanto simple ne interesas. Se oni rigardas al la ĝenerala evoluo de la lingvosciencia sinteno al Esperanto dum la 92 jaroj ekde 1887, oni notas sisteman malkreskon de interesiĝo.

Oni povas plendi. Eble plej elokvente tion faras prof. Waringhien en sia verko *Lingvo kaj vivo*. Kvankam esperantisto, mi ne havas novan plenderon por aldoni al tio. Mankas al mi ankaŭ nova silentero por aldoni al la silento, per kiu la lingvosciencia profesio reagis al la sentoj de Waringhien, kvankam mi estas profesia lingvoscienculo.

Oni povas agi. Ĝis nun plej efike tion faris Szerdahelyi kaj Wells. Tiuj, kiuj volas legi, scias, kie trovi iliajn verkojn pri la lingva strukturo de Esperanto.

Oni povas demandi: A) kial entute la lingvosciencia malinteresiĝo pri Esperanto kaj B) kial la des pli intensa malinteresiĝo ju pli la scienco progresas. Laŭ mia, konfesende magra, scio, ĝis nun neniu arde insistis pri tiuj demandoj. Mi ne kuraĝas pretendi, ke vere tiela ardo min energias. Sed almenaŭ mi certe ne dividas la senton de multaj esperantistoj, ke la respondoj al la demandoj A kaj B, kio ajn ili estu, apartenas pli al la kategorio de nepensmeritaj faktoj de la vivo ol al tiu de solvendaj problemoj. Eble ĉar mi estas esperantisto kaj lingvisto kaj ne sentas emon kunfandi tiujn du flankojn de mia personeco, kaj miras pri tiu manko de emo — eble tial mi ne sukcesas fidi al la facilaj respondoj. Sufiĉe diversa aro da motivoj elektigas science studotajn lingvojn. La angla estas multe analizata, ĉar relative multaj anglalingvanoj aŭ tiulingvemuloj, pro evidentaj sociaj kaj nombraj kialoj, envenas en la lingvosciencan. La sanskrita estas profunde pristudata ĉar vivas seninterrompa tradicio studi ĝin kaj ĝi estas jam multe pli pridemandita, ol preskaŭ iu ajn alia homa lingvo; ĝuste tiu multeco de demandoj jam fari-taj, kaj la modera klareco de la respondoj trovitaj, faciligas la procezon de pludemandado surbaze de la ekzistanta komprenaro. La japana ricevas klerulan atenton parte pro tiaj faktoroj kiel la ĵus menciitaj, kaj parte pro tio, ke la japanoj estas ekonomie kaj strategie unu el la plej gravaj neokcidentaj nacioj por okcidentanoj, kio gravigas ankaŭ ilian lingvon. Krom

ĉi tiaj faktoroj, kompreneblaj al eksterfakulo, sentigas sin ankaŭ puŝoj kaj peloj interne de la lingvoscienco mem. Specifaj fonologiaj, sintaksaj, morfologiaj, semantikaj problemoj, kiuj aparte klare aperas en tiu aŭ alia lingvo, subite amasigas specialajn referaĵojn kaj verkojn pri ĝi. Plej ofte temas pri aferoj, kiuj rilatigas la koncernan lingvon al aliaj lingvoj, spece aŭ familie.

Ĝuste la relativa unikeco — do, nerilatigebla — de Esperanto, ĝia juneco, ĝia manko de propraj homaj kaj ekonomiaj rimedoj, igas ĝin aparte nealloga studobjekto por lingvosciencanoj. Tio ĉi pli-malpli komencas respondi la demandon A — kial entute la lingvosciencia malinteresiĝo pri Esperanto.

Por pli profunda respondo oni devas ekkonsideri la enhavon de la lingvoscienco tempe de la lanĉiĝo de Esperanto. La sciencan arenon okupis la historia demando: kio venis el kio? Oni volis ekscii la devenon de lingvoj kaj de iliaj formoj. Oni kolektis kaj kribris faktojn pri diversaj lingvofamilioj, precipe en la hind-eŭropa familio, kiu etendiĝas de la islanda ĝis la asama, de la rusa ĝis la orisa. Oni teoriis pri la principoj, kiuj okazigas la observatajn evoluojn. Tia emfazo kompreneble ŝovis la malregulecojn de morfologioj kaj sonsistemoj malfonen. Ĝuste en la amasoj da ŝajne kaosaj lingveroj oni strebis trovi la spurojn de ordaj principoj. Esperanto, kies esenco staras sur konscia evito de la vortforma komplekseco, ne povis esperi justan atenton en tia klimato.

Neekscita ĉasejo por strukturistoj

Tio venigas nin al la demando B. Multaj homoj scias, ke la lingvoscienco forvenis el tiu emfaza interesiĝo pri la malregulecoj kaj ĉiam pli enfokusigas la grandajn universalajn regulecojn, kiuj regas ĉiujn lingvojn. Oni scias ankaŭ, ke oni nuntempe malpli fanatike kuras al la pasinteco aŭ al lingvoj de homgrupoj, kiuj ne nas-kas siajn proprajn gramatikistojn, kaj ke oni ĉiam pli emfazas la ĉi-tiamon kaj la ĉi-tieon, la homan kaj median kuntekston, en la scienca analizo de la lingvo kaj ĝia uzo. Ĉu, do, oni ne estus atendinta rimarkindan pliigon de la scienca atento al Esperanto, anstataŭ male?

Unuan respondon ni akiras per ordinara ekzamenado de la evoluo de la lingvo-scienco. Jam dum la epoko

de historiemo, oni estis komencinta la "internan rekonstruon", metodon, kiu dependas de la interna kohero de individua lingvo-sistemo kaj ne de historiaj rilatoj inter malsamaj lingvoj. Oni baldaŭ sukcesis krei metodojn, kiuj ebligas al la analizo de unu individua lingvo la precizecon antaŭe atingeblan nur ĉe la kompara kaj historia studo de pluraj lingvoj. Tiuj metodoj pliprestigis ĉar oni ĉiam pli komprenis, 1) ke ĉiu lingva ŝanĝo okazas kiel unu **parto**, plektita kun aliaj **partoj** en reta, transiro de unu kohera tuto (la antaŭa lingvo) al aliaj koheraj tutaj (la "filinaj" lingvoj), kaj 2) ke do oni devas analizi tiujn tutajn en ilia kohera sistemeco por reliefigi la verajn principojn de la lingvovivo. Naskiĝis la struktura lingvoscienco, kiu votis matematike zorge diagrami la veran arkitekturon de ĉiu alirebla lingvo, unue en unuopaj tempoj (sen konsidero pri la ŝanĝo de unu tempo al alia aŭ pri la parenceco inter diversaj "fratinaj" lingvoj rezultintaj el sama "patrina" lingvo), kaj poste en familia interrilato inter parencaj lingvoj. Paradokse, ĝuste la sistema reguleco de Esperanto kaŭzis, ke ĝi maltrafis ankaŭ la strukturan vagonaron. La strukturaj lingvosciencistoj interesiĝis pri lingvoj, kiuj, anstataŭ porti sian identon sur la maniko, kaŝis sin, donante al la sciencisto okazon eldetekti la veran strukturon per ĉiam pli rafinataj metodoj de spurado. Esperanto estis tute neekscita ĉasejo.

La revolucio de Noam Ĉomski

Post la strukturisma fazo de la lingvistiko alvenis Noam Chomsky (Ĉomski), kies pensado revoluciis la tutan sciencon ekde 1957 per la tiel nomata "Ĉomski-revolucio". Por niaj celoj gravas emfazi du el la mil facetoj de ĉi tiu revolucio. Unue, la lingvoscienco de Ĉomski apogiĝas sur la lingvosento de denaskaj parolantoj de nuntempaj lingvoj. Due, ĝi eĉ pli komplete ol la struktura lingvoscienco emfazas sistemajn koheron kaj konsekvencecon. Ĉi tiuj du aferoj igas la analizon de Esperanto per modernaj metodoj ekstreme malfacila. La plimulto de la parolantoj de Esperanto estas nendenaskaj. Kaj la lingvuzo en Esperanto estas neunueca ĝuste en tiu parto de la gramatiko (la sintakso kaj la fraza semantiko), pri kiu la modernaj lingvosciencistoj plej interesiĝas. Feliĉe, iuj ne tute laikaj legantoj pensas, ekzistas ankaŭ rifuzantoj de la doktrinoj de Ĉomski en la moderna lingvoscienco, kaj ili favoras nin. Bedaŭrinde, la plej tipa direkto de negativa reago kontraŭ Ĉomski en la scienco estas la direkto "naturisma", kiu kritikas Ĉomski pro lia troa atento al la regulecoj en la lingvoj, kaj kiu prefere dronas en la saman kaoson da lingveroj, kie iam hejmis la historiaj lingvosciencistoj; certe ne de tiuj homoj Esperanto ĉerpos simpatian kaj analizemon.

Iomete pli ĝeneralan respondon donos al ni konsiderado pri la tuta lingvosciencia industrio kaj ĝiaj sociaj radikoj.

Kiel oni scias, la aranĝojn de la moderna mondo stariĝis diversaj trudoj kaj konsentoj fare de okcidentaj

(blankulaj) nacioj dum la lastaj jarcentoj, kun iom da helpo de elementoj en la neokcidento, kiuj konsentis kunlabori. Estus stulte troigi la gradon de unueco en la okcidenta naciaro, sed certe almenaŭ esperantistoj bone scias, ke la eksteraj kvereloj inter okcidentaj lingvoj kaŝas ilian kernan kaj komunan oponon al graviĝo de la ĉina, araba, hindia kaj aliaj neokcidentaj lingvoj.

La nuna scienco: Ĉu okcidenta lakeo?

Nu, la profesiuloj de la moderna lingvoscienco, kiel en la aliaj homsciencoj, pli-malpli akceptas la aktualajn aranĝojn de la mondo. Tiu akcepto datiĝas jam de longe, tiel ke la historiaj fazoj de la scienco precize respondas al fazoj en la historio de la maniero de okcidenta mond-estreco. La historia lingvoscienco apartenis al la tempo de frua estiĝo de la modernaj imperioj. La lingvosciencistoj venis kune kun la koloniantoj (ekzemple al Hindlando) kaj ĉerpis el la nove renkontitaj landoj rimedojn (materialojn el lingvoj kiel la sanskrita kaj ĝiaj idoj) por pli bona solvo de la sistemkonstruaj problemoj ĉe hejmlingvaj gramatikoj (de la angla, germana k.s. kaj de la antaŭulaj lingvoj latina kaj helena). La struktura lingvoscienco ekapogeas je la momento, kiam la liberala doktrino ekhavis la impulson doni al la neblankaj kulturoj principan egalrajtecon. En ĉi tiu kunteksto oni devas kompreni la aserton de la strukturaj lingvosciencistoj, ke ĉiuj lingvoj de ĉiuj tempoj estas egale studindaj kaj komplekse evoluintaj. Kaj la moderna lingvoscienco de kaj kontraŭ Ĉomski apartenas al tempo, kiam la mondo estas forme demokratia kaj la okcidento konservas sian mond-estrecon pere de la kunlaboremaj okcidentlingve trejnitaj indiĝenaj elitoj en neokcidentaj landoj. Unuflanke, al la aspiroj de la elitanoj pri kultura aŭtonomio respondas la agnosko en la moderna lingvoscienco de la graveco de la lingvosento de denaskaj parolantoj. Aliflanke, al la nekontestata hegemonio de la Okcidento respondas la fakto, ke la esplorprincipojn determinas la frapaj ecoj de la ĉefaj blankulaj lingvoj. Se la moderna lingvoscienco tiel komplete spegulas la diktan potencon de la Okcidento-dominataj aktualaj mondaranĝoj, ne mirinde do, ke sisteme preterlasigis objektoj kiel Esperanto, kies scienca studo minacas senvualigi la ne tre priflerindan lokon de la lingvosciencia profesio en la nuna monda socio.

Ĉu la konkludo povas esti, ke estas senutile barakti kontraŭ la simptomo (lingvosciencia ignoro de Esperanto), kaj ke necesas, ke esperantistoj konscie alianciĝu sin kun la ĝis nun sporadaj, sufokataj, etgrupaj fortoj en la mondo, kiuj klopodas vere forigi la malekvilibron de potenco kaj komforto inter la Okcidento kaj la cetera mondo? Tio estas tro kompleksa konkludo, tro plena je personaj antaŭjuĝoj, por esti vera. Mi konkludu pli simple, ke mi ne sukcesis gvidi la demandadon al ia respondobordo, sed restas flosa. Aliaj, kiuj vidas pli vaste kaj eble malpli ŝovinisme (malpli kontraŭblankule), povas daŭrigi la demandadon en objektiva humoro, konkluden.

Probal Daŝgupto

Virinoj

— ŝanĝoj necesas en la tuta socio

LA LIBERO DE VIRINOJ dependas same multe de la rekonstruo de la socio kiel de la ŝanĝo de sintenoj. Duonvoje en la Jardeko de la Virino, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, montriĝas signifaj spuroj nek de unu nek de la alia.

”La virina movado restos inter la plej kreaj kaj dinamismaj de nia epoko, restos influo al ŝanĝo...” diras la raporto pri la ”Stato de la virinoj de la mondo”, eldonita en 1979 de la Centro de UN por Socia Evoluo kaj Humanaj Aferoj.

Tiaj ŝanĝoj, kiam ili okazas, kelkfoje estas kontraŭcelaj, avertas la raporto. Ekzemple, kvankam virinoj produktas pli ol duonon de la nutraĵoj en malriĉaj landoj, la pruntado de agrikultura kredito ofte malbonigas ilian ekonomian pozicion. La pruntojn ricevas la finance fidindaj grandbienuloj, ne la etskalaj produktantoj, kaj viroj, kies subskribon oni pli ofte akceptas ol tiun de virinoj.

La farmistino perdas kaj la eblecon altigi sian produktadon kaj la merkaton por sia negranda porvenda produktaĵo. Ŝin oni refoje puŝas al la lasta loko en la

vico por ekonomia evoluo. Evidente tio ne signifas, ke agrikultura kredito estas en si mem malbonaĵo. Sed, por ke ĝin efike uzu la tuta socio, necesas ŝanĝi iujn profunde enradikiĝintajn sintenojn kaj strukturojn.

”Kie ekzistas malriĉo, virinoj suferas plej forte ĝiajn efikojn... Kie ekzistas antaŭjuĝoj, virinoj portas la plej pezan ŝarĝon de diskriminacio”, deklaras la raporto. Ĝi sekvas la ciklon de malegaleco ekde naskiĝo ĝis maljuneco, montrante kiel malriĉo, antaŭjuĝoj kaj analfabeteco sin pluvivigas.

Ina infano estas duaranga en multaj, se ne la plej multaj, homaj socioj. Ekde la nasko la gepatroj kaj la socio faras sian eblon kompensi la bedaŭrindaĵon, rifuzante al ŝi ŝian porcion, kiom ajn malgrandan, de la rajtoj je nutraĵoj kaj klerigo. Ŝi kutime ricevas malpli por manĝi ol la frato. El la ducent milionoj da malsataj infanoj en la mondo, la knabinoj estas la plej inalsataj. Ŝi ofte ne ricevas eblecon edukiĝi. El la septcent milionoj da analfabetoj en la mondo, du trionoj estas virinoj. Ŝi edziniĝas pli frue ol la frato, transdonante sian dependecon de familio al edzo, kaj tro

PERIODAĴOJ:

„Monato” estas, EPĈ fariĝas bela

MEZE DE JANUARO aperis la unua numero de *Monato*, internacia magazino sendependa, kiel diras ĝia subtitolo. Pro multa reklama bruoj, farita unue por la origina projekto de *Semajno* (v. nian revuon de februaro 1979, p.22), kaj poste por *Monato* mem, niaj legantoj scias pri kio temas. La iniciatinto, Stefan Maul, profesia ĵurnalisto el FR Germanio, tandemas nun kun la eldonisto Torben Kehlet el Belgio. Maul ĉefredaktas, Kehlet eldonas. Ĉar monata revuo postulas konsiderinde malpli da fortostreĉo ol semajna periodaĵo, *Monato* havas pli da ŝancoj sukcesi, ol antaŭ unu jaro havis *Semajno*. Sed por sukcesi, necesas ke la esperantistaro transformu siajn aplaŭdojn al la nova periodaĵo en pagitajn abonojn. La eldonisto ĝis nun kolektis malpli ol kvincent pagojn, kio ne sufiĉas por vivteni la revuon.

Kia estas la unua numero de *Monato*? Ĝi estas bela kaj impona. Teme ĝi klopodas ampleksi ĉion de politiko kaj religio ĝis cepa supo kaj krucenigmo. Ĝi estas ankaŭ relative aktuala kaj same tiel novtema. Opinioj

aperintaj en ĝi ne plaĉos al ĉiuj, ĉar tio ne eblas, precipe ne kiam oni traktas temojn politikajn aŭ religiajn, kiel faras ĉi tiu numero. Krom la roloj, kiujn la redaktoro volas doni al sia magazino, *Monato* povus fari ankaŭ lingvan aŭ terminologian kontribuon al Esperanto, ĉar ĝi supozeble traktos temojn al kiuj ĝis nun la Movado dediĉis malmultan atenton. Por fari tion *Monato* devus iom pli zorge poluri sian lingvaĵon ol kiel farite en la unua numero. Generale, la revuo ankoraŭ ne estas tio kio ĝi volus fariĝi — Esperanta ekvivalento de la grandaj nacilingvaj magazinoj; *Monato* ankoraŭ restas amatora tiurilate. Tamen, ĝi kreskos samtempe kun la vastigo de sia abonantaro, kio fortikigos la financon bazon de la revuo.

Alia periodaĵo, *El popola Ĉinio*, eniras sian kvaran jardekon (ĝi ekaperis en 1950) refreŝigita. Ne temas pri la ekstera aspekto de la revuo, kiu laŭ siaj amplekso kaj teknika prizorgo jam delonge okupas la unuan lokon inter la Esperantaj periodaĵoj. Refreŝigita estas la redakta linio de la revuo. Tio fakte ne okazis nur en



ofte la ĉeno de ne sufiĉa nutro kaj analfabeteco komenciĝas denove kiam naskiĝas ŝiaj filinoj.

Sed troviĝas kelkaj helaj punktoj en la ĝenerale neĝojiga bildo. Malgraŭ ke ili laboras pli kaj perlaboras malpli ol viroj, iuj virinoj sukcesis kontribui al sia komunumo en la evoluantaj landoj: En Somalio ili konstruis unuaklasan hotelon. Gabonaj virinoj helpis konstrui lokan flughavenon. En Lesoto oni taksas, ke naŭdek procentojn de la ŝoseoj konstruis virinoj laŭ programo, kiu donis nutraĵojn kontraŭ laboro.

la numero de januaro 1980, sed ĝi komencis okazi jam pli frue, pasintjare. *El popola Ĉinio* fariĝas ĉiam pli leginda ankaŭ por tiuj, kiuj ne interesiĝas ekskluzive pri la politikaj kaj sociaj aspektoj de la vivo en tiu vasta lando. Oni nun trovas en la revuo plurajn ampleksajn artikolojn pri la Esperanto-movado en Ĉinio, informojn el la internacia Esperanto-movado, ĉinajn vidpunktojn pri monde gravaj temoj, dialogon kun la legantoj, karikaturojn, beletraĵojn ktp. Fakte, *El popola Ĉinio* promesas fariĝi internacia, kaj ne nur ĉina, magazino. Se ni konsideras la amplekson kaj la teknan kvaliton de la revuo, *El popola Ĉinio* estas la plej malmultekosta Esperanta periodaĵo (3-jara abono kostas 14,00 gld.), kio certe ludas gravan rolon ĉe la nombro de abonantoj. Lastatempe atingis nin informo, ke ekde la 1-a de majo 1980, la abonkotizoj por *El popola Ĉinio* proksimume duobliĝos (3-jara abono kostos tiam ĉ. 33,00 guldenojn). En la redakciaj planoj de la revuo devus baldaŭ troviĝi du aliaj aspektoj de tiu periodaĵo: 1) La produktoprocezo de la revuo ŝajnas esti tro longa, tiel ke oni nur en januaro povas legi pri okazintaĵoj el septembro kaj oktobro de la pasinta jaro. 2) Refreŝigon bezonas ankaŭ la lingvaĵo de *El popola Ĉinio*, ne ĝia gramatika ĝusteco, kiu plejofte estas senripoĉa, sed ĝia patosa kaj iom tro dolĉvorta stilo.

sm

Virinoj fariĝas forto ankaŭ en kelkaj ekonomiaj institucioj de sia lando. En Hinda Unio ĉ. dek mil virinoj — inkluzive de analfabetoj — nun havas propran konton en kooperativa banko fondita de la Asocio de Sendepende Laborantaj Virinoj. Proksimume kvar mil laboristinoj posedas akciojn. Kvankam virinoj formas malpli grandan parton de la sindikata membraro ol viroj, la nombro plialtiĝas. En Aŭstralio, ekzemple, okazis kvindekprocenta altiĝo inter 1970 kaj 1975.

Tro da laboro — ne maltro — estas tamen la problemo de la plej multaj virinoj en evoluantaj landoj. Por tiuj, kiuj estas la sola mongajnanto en la familio, ĉar la edzo devis trovi laboron ekster sia komunumo, la respondecoj kaj laboro estas senĉesaj. Domlaborojn, kamplaborojn, infanzorgadon, kuiradon, akvoportadon kaj prizorgon de bestoj ŝi devas ĉiutage plenumi. Ĉi tian laboron neniam mezuras ekonomikistoj. "Viran laboriston, kiu metas akvotubon por urba domo, oni rigardas kiel ekonomie aktivan; virino, kiu portas kvardek-kilograman akvokruĉon unu aŭ du horojn tage, faras nur domtaskon", skribas unu observanto.

Kiam virinoj perlaboras monon, tiu sumo estas ankoraŭ hontinde malalta — laŭtakse kvardek- ĝis sesdekprocente malpli alta ol tiu de viroj en kaj evoluintaj kaj evoluantaj landoj. Inter 1955 kaj 1976, la komenco de la Jardeko de la Virino, la diferenco inter la salajroj de viroj kaj virinoj en Usono preskaŭ duobliĝis. En evoluantaj landoj, ekz. Kenjo, ekzistas eĉ pli forta tendenco, ke virinoj kolektiĝu ĉe la malplej alta rango de la salajroskalo. Pli ol duono de la laboristinoj troviĝas en la plej malalta enspezkategorio, kompare al 24 procentoj de la viraj laboristoj. En tiu situacio, kompreneble, kiam postenoj malmultiĝas aŭ kiam laborŝparaj maŝinoj eniras la produktadon, unuavice oni maldungas virinojn.

Je alveno de maljuneco, kio restas al virinoj estas ofte tre malmulte. Kaj, la raporto klarigas, la pozicio de maljunaj virinoj estas aparte malbona en la industria Okcidento. Okcidentaj virinoj vivas meze dek jarojn pli ol viroj, sed en la valorstrukturo de ilia socio tio, kion ili havis por kontribui — servoj, beleco, ama zorgado — aŭ malaperas, aŭ tiuj, al kiuj ili tion donis, ilin forlasas. Ili jam pretervivis sian utilon, kaj al la socio kaj al sia familio. Fenomeno lastatempe studata estas la drivado de tiuj solecaj, dependemaj maljunulinoj al urboj, kie ili formas pli kaj pli grandan parton de la loĝantaro. Tiu bedaŭrinda fenomeno montriĝas ĉiam pli en la evoluantaj landoj, dum industriigo kaj urbigo skuas la solidarecon kaj stabilecon de la familio. La edukitaj junuloj iras al la urbo por laboro, lasante gepatrojn kaj geavojn en la kamparo.

Ĉi tiuj timigaj problemoj de malriĉo kaj malsato ne solviĝos ĝis virinoj havos la rimedojn, sciojn, kapablojn kaj eblecojn ilin solvi, daŭrigas la raporto. Sed altaj estas la baroj, kiujn ili frontas. Necesos reekzameni kaj restrukturi personajn interrilatojn, necesos konstrui pli bonajn kaj pli fortajn fundamentojn por la nacia kaj internacia ekonomia ordo.

Skizo pri finnoj kaj ilia lando

LA ĈI-JARA Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Rauma (Finnlando) — "iom angule en Eŭropo", kiel ĉagrenite konstatis iu estrarano. Sed tio estas tre relativa afero: efektive, Rauma estas pli proksima al la germana marbordo ol al la plej norda Finnlando. La lando ne estas tiom malgranda, kiel kredas multaj (precipe la finnoj mem). Ĝi estas pli granda ol FR Germanujo kaj Aŭstrujo sume, aŭ ĉiuj Britaj Insuloj kune. Nur la finnoj mem ne tre multas: 4,8 milionoj da loĝantoj estas eta nombro en la nuna mondo.

La loĝantaro koncentriĝas en la sudo, tiel ke la lando preskaŭ kliniĝas: en la norda duono loĝas nur 600 000 personoj kaj inter ili restas multe da spaco por libera naturo. Ĝuste dank' al sia naturo Finnlando fariĝis ŝatata libertempejo por mezeŭropanoj. Kaj kvankam oni ĝenerale komencas la prezenton de iu lando per ĝia historio, kaze de Finnlando indas deiri el la naturo. Finnlando dividiĝas en tri ĉefajn naturregionojn: la marborda regiono, la lagregiono kaj la norda parto. La unua el ili inkluzivas 20 000 insulojn kaj insuletojn; la plej granda arkipelago estas antaŭ la malnova ĉefurbo Turku. En la laga regiono akvo kovras kvaronon de la areo. Ofte oni nomas Finnlandon "la lando de mil lagoj", sed tio kompreneble ne estas vera: efektive

povas fali sub -40°C , sed tio ne estas ĉiutaga afero. Entute la naturo tamen estas rigora, kio ne povas ne respeguliĝi en la karaktero de la finnoj: *sisu*, persistemo, estas duonoficiala nacia virto. La finnoj tre fieras pri tiaj aferoj kaj ilin ĉiam ege interesas, kion alilandanoj pensas pri ili.

Sed pli ol la malvarmo la finnan nacia karakteron formis la tuta ciklo de la naturo, la abundo de lumo somere kaj ĝia manko dum vintro. Ĉirkaŭ la Johana tago (fine de junio) la sango kvazaŭ fluas pli rapide, la tuta lando sin banas en somera lumo: eĉ sude en Helsinko la suno brilas 19 horojn ĉiutage kaj la nokton anstataŭas periodeto da ĉarma krepusko, kaj en la plejnordo la suno restas 73 tagojn super la horizonto, sensubire. Sed vintre oni terure pagas pro tio. En Helsinko, la suno pene grimpas sur la randon de la ĉielo por tuj komenci denove fali; en la nordo, tute mankas suno kaj la vintra nokto daŭras kvindek tagojn. Regas *kaamos*, la vintra mallumo, kiu enŝteliĝas ankaŭ en la animon kaj nutras la finnan melankolion.

La finnoj ja estas melankolia popolo. La popolaj kantoj sonas per timemaj minoraj melodioj, kaj kiam la sudamerika tango atingas finnan dancejon, ĝia ritmo kvazaŭ diluiĝas. Pli aktive ritmiĝas nur la stranga finna

Finnlanda pejzaĝo:
Dudek mil insuloj kaj
insuletoj, sesdek mil
lagoj kaj lagetoj.



Foto: Finna Turisma Centro

la lagoj ja estas sesdek mil! Pli norde troviĝas ankaŭ riveroj kun rapidfluejoj. La pli grandajn rapidfluejojn oni digis por elektrocentraloj, sed ankoraŭ ekzistas kelkaj laŭ kiuj oni veturigas turistojn per remboatoj. Kaj plej norde situas Laponio, por multaj finnoj egale ekzotika kiel por eksterlandanoj, la lando de boacoj — kaj kuloj.

Oni supozas, ke tiel norda lando kiel Finnlando nepre estas malvarma. Jes, sed vera somero ekzistas ankaŭ ĉi tie: foje ni ŝvitas je $+30^{\circ}\text{C}$. Nu, vintre la temperaturo

danco *humppa*. Iru al dancejo por ekkoni la finnojn! Al somera dancejo en kamparo, ĉe lagobordo, aŭ al urba "posttagmeza balo" en restoracio, kiun viroj kaj virinoj vizitas post la labortago, survoje hejmen.

La finnoj estas rezerviĝemaj kaj neparolemaj; por ili estas malfacile montri siajn sentojn. Jam kiel infanoj ili lernis, ke dececo postulas silentadon. Ne mirige, ke iuj eksterlandanoj konsideras finnojn eĉ neafablaj; sed oni nur atendu, ĝis oni konatiĝos pli bone. Eĉ se la finno ne ĉiam observas afablecon, des pli li respektas

amikecon. Li mem plej suferas pro sia rezerviĝemo, kaj li bezonas malstreĉilojn. Temas pri la saŭno kaj pri alkoholo.

La finno drinkas por ebriiĝi, por plene ebriiĝi. Tial oni kreis ion kio nomiĝas "alkoholpolitiko" kaj kiun eksterlanda turisto rimarkas ĉefe kiel strangajn malhelpojn, kiam oni deziras iri en restoracion por trinki glason da vino. La restoracio eble ne havas rajton vendi vinon; aŭ je tioma horo oni ankoraŭ ne vendas vinon; aŭ se tamen jes, oni devige devas aĉeti ankaŭ sandviĉon. La ĉefa zorgo de la ŝtata alkoholmonopolo estas altigi la prezojn sufiĉe ofte por bridi la konsumadon. Rezulte de tio, finnoj volonte vojaĝas al Soveta Unio por drinki tie pli malmultekoste. Kaj rezulte de ĉio ĉi, en la tuta Orient-Eŭropo, de Leningrado ĝis Sofio, tre disvastiĝis la onidiro, ke en Finnlando regas prohibicio. Tiel facile estas akiri la famon de sobra popolo.

La finna ŝvitbanejo saŭno malstreĉas en multe pli pozitiva maniero, kaj ĝi estas ŝatata loko por negocadoj kaj diversaj interkonsiliĝoj. Preskaŭ ĉiu finna familio havas je sia dispono saŭnon, ĉu propran, ĉu komunan kun la aliaj familioj de la domo. Dum pasintaj jarcentoj oni eĉ akuŝis en saŭno, kio ja estis tre higiena kutimo. En saŭno ne tiom gravas la varmo mem kiel la kontrasto inter varmego kaj malvarmo: la saŭno prefere situu ĉe lagobordo, por ke oni povu rekte el la varmego salti en malvarmetan akvon. Vintre, iuj nude kuŝiĝas por sin ruli en neĝo; tiuj kun plej multe da *sisu* preferas akvon, atingeblan tra truo anticipe hakita en la duonmetran glacieron. Post saŭnado oni trinkas kafon. Finnlando posedas la mondan rekordon de kafokonsumado je persono. Se vi vizitas finnan familion, la kafujo saltas surfornen antaŭ ol vi sukcesas demeti vian mantelon.

Kvazaŭ por emfazi siajn ekzotikajn trajtojn, la finnoj eĉ ne parolas hindeŭropan lingvon. Por ili, multaj "internaciaj" vortoj de Esperanto estas fremdaj: telefonon ili nomas *puhelin*, universitatan bibliotekon *yliopiston kirjasto* kaj sian propran landon *Suomi* — kaj vi mem eble loĝas en *Saksa*, *Ruotsi*, *Yhdysvallat*, *Alankomaat*, *Itävalta* aŭ *Neuvostoliitto*. Tamen, ilia kulturo estas eŭropa kulturo kaj ili estas eŭropa nacio — kvankam ne en la malvasta senco en kiu oni lastatempe fondis "eŭropajn" Esperanto-centrojn kaj -uniojn en la okcidenta duoninsulo de la kontinento... Multaj historiaj kaj kulturaj rilatoj ligas Finnlandon kun Skandinavio, kaj ekzistas ankaŭ lingva rilato: ses procentoj de la finnlandanoj parolas gepatre la svedan. Plej multaj eksterlandanoj ne scias, ke Finnlando estas konstitucie dulingva lando: la finna kaj la sveda estas egalrajtaj en ĉiuj ŝtataj, administraj kaj edukaj aferoj, kaj la televido kaj radio elsendas relative multe da svedlingvaj programoj. (Lastatempe oni komencis iom observi la rajtojn ankaŭ de la parolantoj de diversaj laponaj lingvoj, sume ĉ. 2 500 personoj.) La svedlingvanoj loĝas ĉefe ĉe la okcidenta kaj suda marbordoj kaj krome en la aŭtonoma insulara provinco Alando, situanta inter Turku kaj Stokholmo. Alando estas la



TEJO saŭnos en Finnlando: Preskaŭ ĉiu finna familio disponas pri familia aŭ komuna samdoma saŭno.

sola regiono de la lando, kie la konstitucia dulingveco ne validas: Finnlando garantias al la provinco ekskluzivan svedlingvecon, kaj alandanoj ekzemple ne bezonas servi en armeo. Antaŭnelonge la Kongresa Komunikado de la Stokholma UK anoncis ekskurson "al la sveda insulo Åland"; kaj estas probable, ke eĉ post la ekskurso ne ĉiuj partoprenintoj scios, ke ili efektive vizitis Finnlandon.

Se oni deziras konatiĝi kun la neeŭropecaj trajtoj de la finna kulturo, oni legu *Kalevala*, la nacian epopeon brile tradukitan en Esperanton. En lando nelokalizebla agas malbigotaj herooj, kaj la plej supera el ili estas Väinämöinen, kiu batalas ne tiom per sia glavo kiom per siaj scio kaj magio, ĝis li en la lasta runo estas forpelita de kristanismo. La kulto de magio, pli rafinita formo de la finnugra ŝamanismo, faras *Kalevala* nekutima nacia epopeo, ĉar en ĝi oni ne tiom elverŝas la homan sangon per armilaj bataloj kiel en *Iliado* aŭ en la mezepokaj eŭropaj epopeoj. La magia forto ofte baziĝas sur scio: oni povas regi iun estaĵon, se oni konas ĝian mitologian devenon. Sed povas esti, ke nenio restis el tiuj mitoj en la finna kulturo... tamen, kiu scias? *Kalevala* estas parto ankaŭ de la monda kulturo, kaj en Britujo ĝi forte inspiris J.R.R. Tolkien, la verkinton de la furoraj *Estro de la ringoj* kaj *Silmarillion*.

Ni eble ne sukcesis plene kontentigi vian scivolemon pri Finnlando. Vi ankoraŭ ne scias, ĉu vere ĉiuj finnoj skias; ĉu viroj kaj virinoj saŭnas kune; kio okazis en la finna kulturo post *Sinuhe la egipto* de Mika Waltari aŭ *Finlandia* de Jean Sibelius; kial preskaŭ ĉiuj finnoj voĉdonas por Kekkonen; kaj tiel plu. Sed kiam vi venos al ni, ni klarigos la reston.

Jouko kaj Tuula Lindstedt

Kongresoj tutamerika kaj pacifika

EN JULIO de ĉi tiu jaro okazos du gravaj regionaj kongresoj, po unu en la du kontinentoj amerikaj. Ricevinte peton organizi la 2an Latinamerikan Esperanto-Kongreson, sekve de la granda sukceso de la unua (Marilio, Brazilo, 1978), argentinaj esperantistoj decidis pri ankoraŭ pli ambicia titolo. Sekve, de la 12a ĝis la 15a de julio okazos ne la 2a Latinamerika, sed la Unua Tutamerika Esperanto-Kongreso, en la argentina urbo San Luis. La Kongreso funkcios i.a. kiel provlaboro por la 66a Universala Kongreso en Brazilio en 1981. Por informoj, skribu al: Unua Tutamerika Esperanto-Kongreso, Casilla Correo Central 289, RA-2000 Rosario, Argentino.

Baldaŭ poste (de la 26a ĝis la 29a de julio), kaj konsiderinde pli norde, Vankuvero (Brita Kolumbio, Kanado) gastigos la 2an Pacifikan Esperanto-Kongreson, kiu kun iom granda prokrasto sekvas la unuan, kiu okazis en januaro 1976 en Melburno, Aŭstralio. Oni esperas allogi al ĉi tiu aranĝo ne nur amerikajn sed ankaŭ aziajn, aŭstraliajn kaj nov-zelandajn esperantistojn. La programo inkluzivos la jarkunvenojn de Kanada Esperanto-Asocio kaj de la usona Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko. Informoj estas haveblaj de Kanada Esperanto-Asocio, P.O.B. 2067, Sidney, B.C., Kanado V8L 3S3.

Tria konferenco okazos

DUM LA 65a Universala Kongreso en Stokholmo okazos la 3a esperantologia konferenco. Diference de la unuaj du konferencoj (1978 kaj 1979) la tria havos kadran temon: "Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado".

La **celo** de la konferenco estas science pritrakti **sociajn** aspektojn de la ekesto, strukturo kaj evoluo de la lingvo kaj ĝia parolantaro. Por helpi al eventualaj interesitoj ni indikas, ke la prelegoj povus ekzemple konsideri i.a. jenajn temokompleksojn: 1) Nelingvaj kaŭzoj de la relativa sukceso de Esperanto; 2) Instruoj el la historio de la Esperanto-movado por la nuntempo; 3) Sociaj faktoroj determinantaj la aktualan evoluon de la lingvo Esperanto kaj ĝia parolantaro; 4) Sociologiaj analizoj pri la strukturo de la nuntempa Esperanto-movado.

La **kondiĉoj** por partopreni: 1) la prelegoj, se eble, konsideru modernajn sciencajn sciojn kaj sekvu la ĝeneralajn normojn de scienca prezentado; 2) prelego ne daŭru pli longe ol 30 minutojn; 3) ĉiu preleganto disponigu post la prelego al CED du kopiojn de la kompleta teksto.

Interesitoj anoncu sian prelegodeziron al la organizanto de la konferenco: d-ro Detlev Blanke, Charlottenstr. 60, DDR-1080 Berlin. Limdato: la 10a de marto.

Emfazo de bonaj trajtoj

Recenzas Renato Corsetti (Italio):

La fenomeno Svislando, de Arthur Baur, Romanshorn: Svisa Esperanto-Societo, 1979. 144+24p. Ilus. 19cm. ISBN 3-85659-001-8.

La fenomeno Svislando estas ĝuste unu el tiuj libroj, kiuj pruvas, ke faktoj estas ofte pli fantaziriĉaj, ol la mensoj de profesiuloj pri fantazio, kiaj estas verkistoj. Ĝi konigas al nesvisoj Svislandon, kaj la interkonatiĝo okazas pere de flue legebla rakonto, en kiu Arthur Baur montras sian tutan ĵurnalisman talenton. Eĉ la ĉapitro pri ekonomio, kiu kutime konsistas el ciferoj, ciferoj, ciferoj, iĝas interesokapta analizo pri la mistero de la svisa riĉeco, pri kiu oni fabelas en eksterlando.

Tre ekvilibre ĉi tiu libro montras la plurajn flankojn de la svisa fenomeno, de historio, tra politiko kaj ekonomio, al kulturo kaj aktualaj problemoj. Laŭdinde, Baur ne nur rakontas faktojn kaj anekdotojn, li klopodas elkribri la esencon, la kialojn, la evolutendencojn kaj donas personajn prijuĝojn pri bono kaj malbono en sia lando.

Ne kredu, ke vi ja konas Svislandon, ĉar vi legis pri Wilhelm Tell kaj aĉetis svisan horloĝon. Unuflanke, niaj lernejoj instruplanoj principe fortunas lernantojn de ĉio, kio okazis trans la limoj, kaj, aliflanke, la amas-komunikiloj (kiuj vole nevole estas la kulturiloj de ni ĉiuj) sisteme evitas informi pri landoj aliaj ol grand-potencaj.

Kritika rimarko trudis sin al mia menso dum la legado, kaj ĝi laŭgrade pliiĝis ĝis la fino de la libro. Baur, fakte, pli multe emfazas bonajn ol malbonajn trajtojn de la svisa socio. Mi ne povas juĝi, ĉu tio dependas de nevenkebla emocia ligiteco al la lando. Ĉiukaze, prisilento de socia konservemo, kiu ja abundas en Svislando, ne estas objektiva fakto. Aliflanke, Baur eĉ klopodas pravigi la "svisajn gnomojn" (p. 75), t.e. svisajn bankestrojn. Ĉiulandaj bankestroj matene "remetas siajn korojn en ŝtalŝrankon," kiel diras poeto. Baur ankaŭ evitas paroli pri la agado de svisaj entreprenoj en triamondaj landoj. Tiu agado estas pli kaj pli kritikata.

La ĉapitro pri kulturo, kiel decas ĉe libro por esperantistoj, estas tre informoplena, kaj el ĝi oni povas formi al si sufiĉe klaran bildon pri la lingva kaj kultura situacio. Oni komprenas, kial socilingvistoj ree kaj denove uzas la svisan lingvan situacion kiel ekzemplon. Por esperantistoj, kiuj interesiĝas pri socilingvistikaj kaj etnismaj problemoj, legado de tiu ĉi ĉapitro estas esenca. Kvankam ne temas pri novaj informoj, ili estas tre skeme prezentitaj.

Laŭ la rimarkoj de Baur, oni emus pensi ke la svisa popolo (ĉiuj loĝantoj en la lando) estas ankaŭ nacio malgraŭ lingvaj malsamecoj, ĉar sendepende de lingvo ĉiuj

svisoj estus kunligitaj per historiaj, ekonomiaj kaj soci-psikologiaj komunecoj. Sed kiu kuraĝus nuntempe paroli pri iu svisa etno? Kiom fakte rolas lingvo en la konsistigaj elementoj de etno?

Fine mi menciuj ke, kiel konscia esperantlingva recenzanto, mi atentis pri preseraroj por diligente listigi ilin. Senrezulte! La uzata lingvospeco estas modele fundamenta kaj ĝueble flua. Mi notis nur dufojan strangan uzon de "vico" anstataŭ "malvirto".

Mendu ĉe UEA: 10,80 (por Nederlando 11,23) gld., plus sendokostoj 10%.

Beletre senpretenda, lingve interesa

Recenzas Vladimir V. Samodaj (Soveta Unio):

Retoj, de Lorjak. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1978. 207p. 18cm. ISBN 951-9005-45-5.

Verŝajne ĉi tiu libro meritas klasifon inter aventuraj rakontoj. Por novelo ĝi estas tro longa, por romano — ne sufiĉe "eposa". La enhavo konsistas el simpla historio pri junulo, perdinta sian laboron, trafinta pro la senlaboreco la "retojn" de juvelfalsa bando. Tute hazarde la junulo heredis grandan monsumon kaj la



grafan titolon, strebis liberiĝi el la "retoj", kaj tiujn strebojn akompanis diversaj aventuroj, kie ne mankis ankaŭ fuĝoj, persekutoj, murdoj kaj belulinoj.

Por pretendema leganto la verko ŝajnos banala, sed ĝi povas trovi ankaŭ ĝuantojn. Se la enhavo ne estas spirhaltiga, do almenaŭ la lingvaĵo parte kompensas la legotempon, ĉar la aŭtoro lerte manipulas lingvolatentojn de Esperanto kaj prezentas konsiderindan kvanton da interesaj esprimoj.

Tamen kelkloke la aŭtoro perfortas sian lingvokrean fantazion kaj regas la leganton per jenaj kunĝuaĵoj:

"leter-en-unu-mane, kaj razil-en-la-alie"; "mi rehejmenvenas"; "enbankuvulo"; "katido miridiotigita"; "buŝo kokidaĵfektrua". Pro tio la teksto iĝas peza kaj malfacile prononcebla, eĉ senvoĉe. Lorjak ankaŭ gramatike eksperimentas iom nekutime, ekzemple: "... laboro konsistis el restuki la murojn"; "unu el ili okupiĝis malplenigi per sia buŝo botelon"; "sen atendo la respondo". Plurfoje vekas la atenton la adverbigo: "kajtielplue"; "la apartamento 6-e numera"; "tio estas vie tre afabla"; "sekvis ilin kiel eble plej ĉee"; "talento... tre lie propra".

Similaj libroj, malgraŭ ke ili ne havas grandan belartan valoron, estas tamen utilaj por la lingvoevoluo, ĉar ili donas materialon por interŝanĝo de opinioj, por prikonsidero de nove proponitaj formoj, kaj poste la multmensa opinio de diversnaciaj lingvo-uzantoj praktike decidas, kiuj el tiuj proponoj estas uzindaj kaj kiuj ne meritas atenton.

Mendu ĉe UEA: 22,20 (por Nederlando 23,09) gld., plus sendokostoj 10%.

Majstra prezentanto

Recenzas David Hill (Britio):

Veselin Damjanov kantas en Esperanto, Sofia: Balkanton, 1978. 30cm, 33t/m, duflanka, stereofona gramofondisko. BOA 2180.

Veselin Damjanov kantas en Esperanto, Paderborn: Esperanto-Centro, sen indiko de la eldonjaro (1979), 17,5 cm. 45t/m. Duflanka, stereofona gramofondisko. ECP-1.

Jam preskaŭ legendo estas la bela voĉo kaj sorĉa stilo de Veselin Damjanov, prezentinto ĉe pluraj Universallaj Kongresoj, laŭreato de la unua internacia konkurso de la Esperanta kanzono (Francio, 1978). Jen du diskoj sur kiuj la kantisto registris entute 18 kantojn el sia repertuaro originala kaj traduka. La unua, 30-centimetra disko, registrita de la Bulgara Radio en 1977, surhavas 12 kantojn: 3 operetaj, 2 romantikaj, 2 leĝeraj, 2 popolaj kaj 3 de la kantisto mem. La dua, 17,5-centimetra disko, eldonita de Esperanto-Centro Paderborn, surhavas 6 kantojn: 3 leĝeraj, 1 popola kaj 2 denove de Damjanov mem — miksaĵo simila al la pli granda disko.

Iom absurde ambaŭ diskoj portas la saman titolon. Tamen, teknike ili ne egalas: la registra kvalito de la pli granda disko estas ne sufiĉe bona. Almenaŭ ĉe la du ekzempleroj kiujn mi aŭskultis, estis tro da surfaca bruoj kaj la registrado ne sufiĉe redonis la tembrojn kaj ampleksojn aŭ de la voĉo aŭ de la piano. La bela kantado de Damjanov meritas pli fidelan traktadon ol ĉi tie. La malgranda disko estas multe pli kontentiga ĉi-rilate.

Aspekte la kovrilo de la granda disko allogas per fotoj de la kantisto, "verdsteleca" stilo kaj alineo pri la arto

de la kantisto. Kompense, kaj eble pli utile, la malpli ornamenta kovrilo de la malgranda disko presas ĉiujn tekstojn, dum la granda donas nur liston de titoloj. Por ambaŭ diskoj la sperta kaj vigla piana akompano estas de Evgeni Komarov.

Sume, ambaŭ diskoj estas nepre posedendaj de ĉiuj kiuj ŝatas kaj apogas nian burĝonantan kantarton, de kiu Damjanov estas tiel majstra prezentanto.

Mendu ĉe UEA (kaj nepre indiku, ĉu vi volas grandan aŭ malgrandan diskon): granda disko 18,00 (por Nederlando 21,24); malgranda disko 9,00 (por Nederlando 10,62) gld., plus sendokostoj 10%.

Bonaj intencoj ne sufiĉas

Recenzas Rejna de Jong (Nederlando):

Esperanto in Rubrieken de W.H.W. van Liempt. Bodegraven: Stichting Esperanto bij het Onderwijs, 1979. 147p. 21cm.

La intenco de la aŭtoro kontribui al la vortprovizo de la nederlandaj esperantistoj estas laŭdinda. Bedaŭrinde, la verko estas nova pruvo, ke "bonaj intencoj" per si mem ne sufiĉas. Pro manko de la alfabeto ordo — trovebla nur en la ĉapitroj 12 kaj 25 — ne eblas rapide trovi bezonatajn vortojn. Plia malfacilaĵo estas la enrubrikigo: kiu serĉus **ruĵo**, **sukerpeco**, **memserva lesivejo** sub **meblaro**?!

Ĝenas ankaŭ la multfojaj ripetoj: **bestĝardeno** en 9, 16, 17; **friduĵo** en 6, 7, 13; kune ili plenigus multajn paĝojn. Krome, la verkinto ofte intermiksas la komon kaj la punktokomon, kiuj aparte gravas en tia verko. Unu ekzemplo el multaj: *cocon*; *pop* — **kokono**; **kri-zalido**; **pupo**. Ĉu **kri-zalido** estas sinonimo de **kokono** aŭ de **pupo**?

Strange impresas: *pauze* — **maĵoj**; **paŭzo** kaj *huurvergoeding* — **tanto**; **lukompenso**, kie "maĵoj kaj "tanto" estas restaĵoj de la supra linio, mallertaĵo oftega, sed evitenda. La aŭtoro sufiĉe bone plenumas la promeson pri "nuntempaj" vortoj, sed kial: **Persio** (Irano); kie en la nuna Nederlando troviĝas *staalmeesters* (**drap-ekspertoj**), aŭ *hoofdonderwijzer* (**supera instruisto**) apud *hoofd der school* (**lernejestro**)?

La tradukoj grandparte taŭgas, sed ne ĉiam: *ketelsteen* — **tartro** (= **kaldronkrusto**) ; **duŝo** (p. 23) (= **duŝejo**) ; **karniforoj**, **herbiforoj**, **omniforoj**, **insektivoroj** (tiel!). Ofte enestas sinonimoj sen klarigo: *ontspanning* — **distro**; **malstreĉigo**; *bepaling* — **komplemento**; **adjekto**; **epiteto**; **suplemento** (!). Mankas kelkfoje "logiko": **envagoniĝi** sed **eliri**; **trajnvojaĝo** sed

boatveturado. Svarmas malprecizaĵoj: mankas **c** en la alfabeto, forestas **ŝi sidas** (p.4). Cetere, 40 preseraroj troas en lernolibro!

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

Facilgusta kaj distra

Recenzas Aldo de' Giorgi (Italio):

Kara diablino, de Douglas P. Boatman (1892-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 112p. 21cm. Belliteratura Eldonserio 40. ISBN 90 6336 014 2.

Mi diru premise, ke ĉi tiun libron mi legis unuspire dum nokta, teda trajnveturo hejmen el Roterdamo. Kaj miajuĝe la romano de Boatman taŭgas ĝuste por similaj okazoj, t.e. kiam oni bezonas legaĵon kun sufiĉe da scivolotiklaj aventuroj, intrigoj, surprizoj k.s. por ne permesi endormiĝon, sed ankaŭ kun absoluta manko de ĉiu ajn intelekta pretendo por ne tro laborigi la cerbon en tiaj neidealaj situacioj. Jen, per tio estas jam difinita la esenco de la libro. Fakte ĉi tiun novan eldonon de TK-Stafeto mi ne scius kiel katalogi: ĉu kiel kriman aŭ erotikan, misteran aŭ sciencfikcian, romantikan aŭ futureman romanon; tiel multaj estas la ingrediencoj, verdire iom senorde enmetitaj de la aŭtoro.

Mi ne kanvasu la rakonton, por ne depreni de la legonto la surprizon pri la abundaj scenŝanĝiĝoj, kiuj disruliĝas senhalte sed kaose kaj iel taglibre (Kioma ripetado de detaloj: "Li vekigis, ellitigis, duŝis, sin vestis, matenmanĝis..."). kaj kies ĉefa karakterizo estas sendube la plej absolutaj neverŝajno kaj nekredblo.

La libro legiĝas sen peno ĉar la uzita lingvaĵo estas sufiĉe simpla kaj glata, kvankam kelkfoje iom teda pro la cititaj kaj aliaj ripetoj (Regule, gurde uzita la verbo "intermeti" anstataŭ "respondi", "aldoni", "pludiri", "daŭrigi", "interveni", "emfazi", "impeti", "elspiri" k.s.). Mistera por mi la origino de "riposti" (respondi). Krome enŝoviĝis kelkaj evidentaj anglismoj kaj nelogikaĵoj ("atmosfera de mantelo kaj ponardo", "ŝi sin diras", "cent-pro-cent", k.a.) aŭ rektaj eraroj, precipe pro nekorekta uzo de la prepozicioj ("Rozo komencis per diri", "juĝas la aferojn el sama vidpunkto **kiel ties**", ktp). Male, kelkajn aŭdacetojn mi taksas almenaŭ tolerblaj ("li estas vera venontulo", "ŝi estis eldrenita").

En ĉiu nacia libromerkato ja abundas tutaj serioj da tiaj facilgustaj, senpretende distraj libroj. Kaj ili vendiĝas, ofte pli larĝkvante ol multaj proklamitaj ĉefverkoj beletraj (Bedaŭrinde, jes, ja, tamen...). Do, se ni pretendas, ke nia literaturo estu en ĉio samnivela kiel la naciaj, ankaŭ tiaj verkoj povas havi sian rajtan lokon kaj sian legantaron. Cetere, la recenzita volumo prezentigas tre belaspekto, kun plasta kovrilo, bela papero kaj ĉarma desegnaĵo de la ilustristino Jean Bomford. **Mendu ĉe UEA**: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

LIBROSERVO de UEA havas denove limigitan stokon de kelkaj elĉerpitaj libroj: **LA FARAONO** (42,00 gld.), **SUPERA KURSO DE ESPERANTO** de Dreher (4,50), **E-RUSA VORTARO** (10,50), **FABELOJ IV** (15,00).

Cultural value of Esperanto, The (1965), D.B. Gregor (1909-). Rotterdam: UEA, 1979. 12p. 21cm. ED-19A. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto, een Europese of een Aziatische taal?, Claude Piron (1931-). El Esperanto trad. Paul Peeraerts. Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 1979. 36p. 21cm. Traduko de Esperanto-Dokumentento 10E. Prezo: 3,30 gld.

Esperanto: Gramatiko, Esperanta-latva vortaro, Latva-Esperanta vortaro, E. Jaunvalks kaj A. Gūtmanis. Riga: Liesma, 1979. 577p. 17cm. Bindita. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto or English?, Henri Masson. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1980 (fakte 1979; dua eld., ampleksigita). 83p. Mimeo. Ilus. de J.S. Brilleaud. 21cm. LJP-broŝuro 134A. Prezo: 3,60 gld.


Esperanto-serbokroata vortaro; Suplemento, Marinko Gjivoje. Zagreb: IKS, 1979. 16p. 17cm. Prezo: 1,50 gld.

Hirosima-Nagasaki; Bilda dokumento pri la atombombado (1978). El la japana trad. diversaj. Tokio: Eldon-Komitato por Hirosima-Nagasaki, s.j. (1979). 344p. Ilus. 29cm. Bindita. Fotoj kaj pentraĵoj, iuj koloraj, kun raportoj kaj poemoj pri la du atakoj per atombombo en 1945. Senpage distribuata. Ekspedokostoj: 12,00 gld.

Historio kaj biografioj, J. Vondroušek (1904-). 1977. 29p. 17cm. Tre konciza historio de la E-movado, kun biografiaj notoj, aranĝitaj proksimume laŭ kronologio, pri ĝiaj elstaraj figuroj, precipe tiuj el Ĉeĥoslovakio. Prezo: 1,80 gld.

Infanoj en la mondo, Grethe Horn Mathismoen. El la dana trad. Eliza Kehlet. Kopenhavn: Dana UNICEF-Komitato, 1979. 32p. Kolorilus. de Eli Bø kaj Bente Giset. 30cm. ISBN 87 87476 21 5. Bele desegnita instruilo pri la kulturaj kaj ekonomiaj bezonoj de homoj tra la mondo. Prezo: 11,10 gld.

 **infanoj en la mondo**



Brian Merriman
la Noktmeza Kortumo



Konstrui Novan Ponton

Kiel organizi landan kongreson? Paris: UFE, s.j. (1979). 34p. Mimeo. 30cm. Konsilaro. Prezo: 6,30 gld.

Komuna internacia tarifo por la transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (TCV). Kajero 1. Generalaj transport-kondiĉoj (1977). El la franca trad. Nils Gösta Narvala. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, 1978 (3a ĝisdatigo). 32p. 30cm. Interesitoj kontakti s-ron G. Ritterspach, Berliner Allee 1, D-6070 Langen, FR Germanio.

Konkordanco de Marta (kun teksto), M. Kidosaki. 2 volumoj. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1979. Vol. 1: *Marta* (1873), Eliza Orzeszko (1841-1910). El la pola trad. (1910) L.L. Zamenhof. Fotorepreso laŭ la 3a eldono (1928). 237p. Vol. 2: 7+18+248p. 24cm. Indekso laŭ paĝo kaj linio de ĉiuj radikoj substantivaj, verbaj kaj adjektivaj. Prezo: 24,60 gld.

Konstrui novan ponton, Wan Yun. El la ĉina. Beijing: Fremd-lingva Eldonejo, 1979. 37p. Kolorilus. de Chen Yongzhen. 19cm. 88-Es-156S. Kartone bindita. Fabelo pri kunlaboro inter sciuro, leporo, ĉimpanzo kaj elefanto. Prezo: 1,50 gld.

Kroatserba-Esperanta vortaro (1966), Marinko Gjivoje (1919-). Zagreb/Pisa: Internacia Kultura Servo/Edistudio, 1979 (2a eld.). 369+16p. 17cm. ISBN 88 7036 020 2. Prezo: 16,20 gld.

Kroatserba-Esperanta vortaro; Suplemento, Marinko Gjivoje (1919-). Zagreb: Meĉunarodni centar za usluge u kulturi, 1979. 16p. 18cm. Prezo: 1,50 gld.

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, Tibor Sekelj (1912-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 95p. Ilus. 21cm. Belliteratura eldonserio 42 ISBN 90 6336 018 5. Aventuroj inter la indianaj triboj en Brazilo. Prezo: 9,60 gld.

Kwa kulinda tamadumi za Afrika. Rotterdam: UEA/TEJO, s.j. (1979). 12p. Ilus. 28cm. Traduko de la broŝuro *Por la defendo de afrikaj kulturoj*. Prezo: 5,10 gld.

Language equality in international relations, Ralph Harry kaj Mark Mandel. Rotterdam: UEA, 1979. 28p. 21cm. ED-21A. Prezo: 3,00 gld.

Langue et droit à la communication. Rotterdam: UEA, 1979. 48p. 21cm. ED-6F. Prezo: 3,00 gld.

Lingvogvidilo Esperanto-hindia, W. Kobelt, M.A. Vyas kaj Yashovardhan. Zürich, 1979 (ne indikita). 8p. 15cm. Faldfolio kun hindiaj frazoj utilaj por turistoj. Prezo: 1,50 gld.

Literatura antologio (1905). Red. kaj el la pola trad. Kazimierz Bein. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1977 (fotorepreso de la eld. de 1940). 127p. 20cm. Parto de *La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj*, kun verkoj de Sienkiewicz, Prus k.a. Prezo: 4,50 gld.

Lumo kaj ombro, V. Eroŝenko (1890-1952). Kompilis Yositaka Mine. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1979. 95p. 18cm. Noveloj, poemoj kaj artikoloj de la fama blinda rusa esperantisto, kiu multe vojaĝis en Japanio kaj Ĉinio. Kun notoj pri la teksto. Prezo: 11,10 gld.

Merlo sur menhiro (1974), Albert Goodheir (1912-). Glasgow: Kardo, 1979 (2a eld., pliampleksigita). 94p. Ilus. de Ruth Goodheir. 21cm. ISBN 0 905149 10 1. Poemoj, ĉefe lirikaj, sed ankaŭ rakontaj, moralaj, humuraj. Prezo: 13,50 gld.

Noktmeza kortumo, La (1780), Brian Merriman (1757-1805). El la irlanda (gaela) trad. Albert Goodheir (1912-). Lelystad: Vulpo-Libro, 1980. 36p. Ilus. 21cm. ISBN 90 70074 07 9. Rakonta poemo pri kortumo de feinoj, kiu enketas pri mistraktado de virinoj fare de viroj. Prezo: 4,20 gld.

Notoj survoje (1977), Damaris Parker Rhodes. El la angla trad. Kris Long. Morecambe: Kvakera Esperantista Societo, 1979. 22p. 15cm. Lampiro 4. Kvakeraj aforismoj. Prezo: 1,50 gld.

Popolaj fabeloj el Finnlando. Red. Vilho Setälä (1892-). Espoo: Setälä, 1979. 16p. 15cm. Presita per nekutima sensupersigna alfabeto. Prezo: 2,40 gld.

Prilingvaj artikoloj de Ossaka; Liaj cirkuleroj interne de la Lingva Komisiono de Japana Esperanto-Instituto, K. Ossaka (1888-1969). Kompilis Naokazu Kawasaki. Kasiwara Esperanta Dokumento-Centro, 1978. 59 folioj. Fasko de grandformataj (26x36cm.) fotokopioj. Interesa "krudmaterialo" por esperantologoj. Prezo: 16,50 gld.

Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio. El la hungara. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 41p. 18cm. Akceptita dum la Naŭa Kongreso (1975). Prezo: 1,20 gld.

Revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno, La, Kompila Grupo por la Broŝuroj pri la "Moderna Ĉina Historio". El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 11+124p.+mapo. Ilus. 19cm. 11-Es-1372P. Pri grandskala sed malsukcesa revolucio en Ĉinio de la periodo 1850-1870. Prezo: 3,60 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

23a INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ:

Eŭropo kaj Tria Mondo

INTERNACIA Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), inter la 28a de decembro 1979 kaj la 4a de januaro 1980, ĉi-foje iris al Bavario, al monto-supra kastelo apud Würzburg, por fronti la fakton, ke en nia mondo estas efektive pluraj mondoj. En jaro, kiam multaj eŭropanoj subite konsciiĝis pri terura malsato en Kampuĉio, antaŭe ne sciinte eĉ pri la ekzisto de tiu lando, esploro pri la rilato inter Eŭropo kaj la Tria Mondo estis taŭga temo por la 23a IS. Denove, numero de *Kontakto* troviĝis en la dosieroj de la partoprenantoj. Per serio da artikoloj ĝi provis informi pri la komplekseco de la koncernaj demandoj. Tiu numero estas nun havebla ĉe TEJO (4,00 gld).

Gerald Roemer kaj Judith Bormann preparis ekspozicion pri la temo, kaj Roemer krome gvidis laborgrupon pri nutrado kaj saneco en la Tria Mondo. Dario Besseghini kaj Ina Tautorat en laborgrupoj koncentris sin al la kulturaj aspektoj de la rilatoj inter Eŭropo kaj la Tria Mondo, dum Elisabeth Schwarzer esploris la ekspluatadon flanke de internaciaj konzernoj. Thomas Bormann prelegis specife pri Kampuĉio, Roemer ĝenerale pri la ekonomiaj kaj politikaj interrilatoj de industriaj landoj kaj evolulandoj, kaj Senad Čolić traktis pri la transigo de teknologiaj scioj. Klaus Schubert kaj Guido Brandenburg parolis pri la agado de Amnestio Internacia kaj *Terre des Hommes* en la Tria Mondo; Claude Trésorier pensadis pri la rolo de Esperanto tie.

Entute, la etoso de la IS verŝajne ŝuldiĝas al tio, ke seriozaj prelegoj kaj laborgrupoj miksis sin kun netemaj sed egale interesaj programeroj. La IS vere estas unikaĵo, kaj ĝi devas nun esti organizo kaj lingvonivele la plej bona junulara kunveno inter tiuj, kiuj regule okazas samlande. Agrable nova ĉi-jare estis la partopreno de mezaĝuloj kaj familioj kun junaj infanoj, pri kio vidu apartan raporton ĉi-paĝe.

Ian Jackson

Festivalo por mezaĝuloj

KUTIME novnaskiton anoncas la gepatroj. Ĉi-foje 23-jara infano konigis al la mondo la naskiĝon de sia paĉjo. Kaj ambaŭ fartas tre bone, dankon. La infano nomiĝas Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo kaj la novnaskito Internacia Festivalo por Mezaĝuloj (IF).

Jam de jaroj pli aĝaj ĉeestantoj de la famaj Seminarioj sentis la bezonon disponi pri alia jarfina renkontiĝo,

speciale por homoj, ni diru inter 25- kaj 50-jaraj. Malmultaj tamen supozis ke tiu alia aranĝo disvolviĝus samtempe kaj samloke kun la Seminario. Tiu koincidigo montriĝis tre sukcesa. Aliĝintoj al IF povis ankaŭ ĝui la laborgrupojn de IS kaj la gejunuloj de IS ne malinteresiĝis pri la aktivecoj de la pseŭdojunularo de IF. Dank' al tiu kunigo ni povis ĝui gamon da diversaj programeroj variantaj de "partnera masaĝo" ĝis "bati-ko" kaj de "vin-seminario" ĝis "grafologio".

Sed krom la ĉeesto de junuloj kaj duonjunuloj spicis la festivalon aro da infanoj babilantaj en Esperanto, kiuj ĝuis apartan programon, por ke la paĉjoj kaj panjoj povu kviete pritrakti sian tagordon.


La unua Festivalo por Mezaĝuloj montriĝis aranĝo vere ĝuita de verŝajne ĉiu partopreninto. Germana Esperanto-Junularo meritas laŭdon pro la iniciato kaj efektivigo.

P. Peeraerts

TEJO en Nairobi

KIAL ĉeestis TEJO-observanto en Afrika Regiona Kunveno de Unesko, fine de la pasinta jaro en Nairobi, Kenjo. TEJO-membroj mankas en tiu kontinento pli ol en iu ajn alia, kaj sen kompreno pri la afrika junularo, TEJO ne esperu ĝin varbi al Esperanto.

La Kunveno traktis la temon "Loko de gejunuloj en moderna Afriko rilate la tradiciajn valorojn kaj afrikajn alternativojn de socia kaj ekonomia evoluo". Kvindek



Ian D. Tarrant, antaŭa volontulo de UEA/TEJO, reprezentis nin dum la junulara kunveno de Unesko en Nairobi.

da spertuloj el internaciaj junularaj organizaĵoj, registaroj kaj universitatoj, precipe afrikaj, diskutis dum semajno du referaĵojn: "Afrika junularo inter tradicio kaj moderno" kaj "Labordonaj naciaj junularaj programoj en Afriko: stato, problemoj kaj perspektivoj". Konklude, la partoprenantoj ellaboris rekomendojn kaj al Unesko kaj al la registaroj de afrikaj ŝtatoj.

Estas konata strategio de KER de TEJO ĉeesti neesperantistajn junularajn kunvenojn. En Nairobi tio eblis, kiel pro la konstantaj rilatoj inter TEJO kaj la junulara fako de Unesko, tiel ankaŭ pro la fakto, ke nia observanto nun laboras en Kenjo kaj do povis partopreni sen gravaj financaj ŝarĝoj por la buĝeto de TEJO.

La Nobla Korano



La unuaj du eldonoj de ĉi tiu verko jam delonge elĉerpiĝis. Nun estas aĉetebla represo de la 2a eldono pretigita en Irano. Libro-servo de UEA transprenas la taskon de la ĉefa distribuanto de ĉi tiu libro. Tio signifas, ke oni ricevas 33-procentan rabaton por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj, sendotaj al la sama adreso. Kiel kutime, aldoniĝas 10 procentoj por sendokostoj

LA NOBLA KORANO. Tradukis Italo Chiussi (1919-1973). Teherano: 1978 (sen indiko). Represo laŭ la 2a eldono de TK en 1970. 692p. 22cm. Bindita. Serio Oriento-Okcidento n-ro 10. Prezo: 42,00 guldenoj. Mendu ĉe la Libro-servo de UEA, kiu tamen havas nur limigitan stokon.

Jugoslavio

• Fariĝas oftaĵo en pluraj landoj, ke esperantistoj estas honorataj per urbaj, regionaj aŭ ŝtataj distingoj. Ankaŭ en Jugoslavio tio plurfoje okazis. Tamen, verŝajne ne okazis pli frue, ke tuta regiona organizaĵo estu distingita. Tio okazis en novembro pasintjare, kiam Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino ricevis tre altrangan – Ordeno de Meritoj por la Popolo, kun Arĝenta Stelo – rekonon de la Prezidento de Jugoslavio. La distingo ligiĝis al la 30-jara ekzisto de la organizaĵo, kiu precipe en la lasta jardeko apartenas al la plej viglaj kaj sukcesaj movadaj unuigoj en Jugoslavio. Aparta merito de la Ligo estas ĝia integriĝo en la socian strukturon de sia medio, kiu jam de jaroj kunfinancas ankaŭ la disvastigon de Esperanto en tiu parto de la lando.

Sud-Afriko

• "La babela konfuzo kostas riĉaĵon", ampleksa (preskaŭ 3000-vorta) artikolo de Edwin de Kock, aperinta en la periodaĵo *Buurman*, estas represita kiel aparta eldonaĵo kaj nun uzata de Sud-Afrika Esperanto-Asocio kiel informilo en la afrikansa lingvo. Al la artikolo aldoniĝis konciza (16-regula) gramatiko de Esperanto.

Usono

• Kun subteno de la Sekcio pri la Aplika Lingvistiko en la Universitato de Illinois, en Urbana-Champaign, la 10an de majo 1980 okazos Simpozio pri Gepatralingva Influo en Esperanto. La organizantoj de la Simpozio estas profesoroj Chin-Chuan Cheng kaj Bruce Sherwood,

kiuj bonvenigas referaĵojn pri ĉiuj aspektoj de la temo, inkluzive de sintakso, leksiko, fonologio kaj sociaj faktoroj. Limdato por resumoj estas la 10a de aprilo. Kontaktadreso: prof. Bruce Sherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, Urbana, Illinois 61801, Usono.

Britio

• D-ro John C. Wells estis unu el la gastoj la 10an de februaro ĉi-jare en la programo "Parolante pri la angla" en la Monda Servo de BBC. Wells tie intervjuiĝis pri diversaj aspektoj de la lingva problemoj kaj longe klarigis pri Esperanto. Liaj klarigoj estis ilustritaj per la elsendo de du Esperantaj kantoj ("Ĉiuj floroj estas for" kaj "Jen nia mondo").

Hungario

• Fine de la pasinta jaro tri bone konataj aktivuloj de la hungara Esperanto-movado ricevis gravajn ne-movadajn rekonojn: Scienca

Universitato Eötvös Loránd, ĉe kiu pli ol dek jarojn funkcias Esperantofako, honoris d-ron L. Györy Nagy per "fera", kaj s-ron A. Pechan per "ora" diplomoj. Laŭ propono de la Prezidio de Landa Konsilio de Sindikatoj, la hungara registaro distingis s-ron Tibor Vaskó, sekretarion de Hungara Esperanto-Asocio, per bronza grado de la Ordeno de Laboro.

• Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario) okazigos sian 18an sesion ĉi-jare inter la 6a kaj 12a de julio. Kiel kutime en tiu renomata aranĝo, ankaŭ ĉi-foje la programo estos altnivela kaj varia (prelegoj, koncerto, filmprezento, ekskursoj, ekspozicioj). La prelegaro traktos sociajn, kulturajn, artajn, sciencajn kaj movadajn temojn. Limdato por aliĝoj estas la 31a de majo 1980. Programkajeron kun aliĝilo oni petu ĉe: Somera Esperanto-Universitato, 48-as u. 1. TIT, H-5700 Gyula, Hungario.

Soveta Unio

• Fine de 1979, importejoj de sovetaĵoj libroj kaj periodaĵoj sondis en pluraj landoj pri bezonataj kvantoj de aperonta soveta periodaĵo en la Internacia Lingvo. Tio akordiĝas kun neoficialaj informoj de iuj delegacioj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj dum la Kongreso en Lucerno, kie oni menciis ankaŭ la planojn eldoni ruslingvan informan gazeton pri Esperanto. Intertempe venis neniam oficialaj konfirmoj pri baldaŭa ekapero de tiuj periodaĵoj. Fine de 1979, la plurlingva semajna

Vi preskaŭ malfruas

kun via abono al KONTAKTO por ĉi tiu jaro! Vidu apude: delonge aperis la lasta numero por 1979, kaj oni estas profunde en la redaktaj laboroj por la unua ĉi-jara numero. Ĉiu juna membro de UEA/TEJO ricevas la revuon aŭtomate. La novaj junaj membroj (10–18-jaraj) ricevos ankaŭ KONTAKTON dum du jaroj kontraŭ unujara kotizo. Se vi ne estas inter tiuj du membrokategorioj, rapidu, vi malfruas!

kontakto



gazeto *Moskvaj novaĵoj*, en sia numero 51 (2883) de la 23a de decembro, aperigis en sia anglalingva eldono 16-paĝan suplementon en Esperanto. La enhavo de la suplemento, kiun "esperantigis la sovetia MEM-sekcio", konsistas el lastatempaj paroladoj kaj aliaj elpaŝoj de sovetiaj politikaj gvidantoj.

Germana DR

- La tre vaste legata semajna gazeto *Wochenpost* (eldonkvanto 1,5 milionoj da ekzempleroj) aperigis en sia numero de la 7a de decembro 1979 tre ampleksan tutpaĝan (formato A3) artikolon pri Esperanto. Kvankam tiu artikolo de Sabine Herklotz portas la titolon "Ĉu oni ankoraŭ parolas Esperanton?", ĝi ŝajnas esti kompetenta kaj pozitiva prezento de la nuna stato de la Esperanto-movado, kun aparta akcento pri la enlandaj eblecoj informiĝi pri la lingvo kaj lerni ĝin.

Svedio

- La espero*, revuo de Sveda Esperanto-Federacio, markis per speciala numero fine de 1979 la jubileon de la landa Esperanto-movado — naŭdek jaroj de Esperanto en Svedio. En la periodaĵo, ĉiu el la pasintaj naŭdek jaroj ricevis apartan ĉapitron kun la plej esencaj historiaj mencioj. Kiel ĉio alia en redakta prizorgo de Franko Luin, ankaŭ tiu speciala numero de *La espero* estas aparte bela kaj grafike elstara.

Persone

Daŝgupto

- Probal Daŝgupto, 26-jara hindo, kies nomo jam dekon da jaroj aperas inter la kunlaborantoj de nia revuo, sukcese defendis sian doktoran disertacion ("Demandoj kaj relativaj kaj komplementaj subpropozicioj en la bengala gramatiko") ĉe la Nov-Jorka Universitato la 4an de decembro 1979. Fine de januaro Daŝgupto venis al la Centra Oficejo de UEA, kie li volontule oficos ĝis januaro 1981. Li okupiĝas ĉefe pri la libroservaj kaj — kiel vi povas

konstati aliloke en ĉi tiu numero — revuaj laboroj. La nova adreso de Daŝgupto estas do tiu de UEA mem.

Auld

- Mag. William Auld, la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto, nur pasintjare kontribuis per pluraj librovolumoj al la Esperanta originala kaj traduka literaturo. Tio povus ripetigi ankaŭ en 1980, kiam devus aperi i.a. lia traduko de Ŝekspiraj sonetoj. Krome, Auld nun tradukas la romanon *La montara vilaĝo* de la ĉina verkisto Ye Jun-jian, esperantisto konata sub la pseŭdonimo Cicio Mar (lia novelaro *Forgesitaj homoj* aperis en 1937).

Fake

Informado

- Unu el la plej grandaj franclingvaj ĵurnaloj de Belgio, *La Dernière Heure*, kiu aperas en Bruselo en eldonkvanto de ĉ. 140 000 ekzempleroj, ĵus enkondukis monatan rubrikon pri Esperanto. Tio certe estas grava atingo en la informa laboro, precipe pro la fakto ke ĝi okazas en lando perturbata de sia propra lingva problemoj kaj tial aparte interesita pri tiaspecaj demandoj. La iniciato meritas apogon, precipe de la legantoj de la ĵurnalo, kiuj povas skribi

al: *La Dernière Heure*, Rubrique Espérantiste, 79 boulevard Emile Jacqmain, B-1000 Bruxelles, Belgio. La rubriko, kies prizorganto ŝajne fariĝos Germain Pirlot, bonvenas ankaŭ pro tio, ke la Movado ĝis nun estis multe pli forta inter nederlandlingvaj ol inter franclingvaj belgoj.

Radio

- La tradicia superrigardo de Georges Larglantier, redaktoro de nia radiorubriko, pri la pasintjaraj radioelsendoj en Esperanto, montras, ke en la jaro 1979 okazis 2 983 elsendoj de 14 radiostacioj en 11 landoj en 3 kontinentoj. La elsendoj daŭris 1 082 horojn. Plej multe da elsendoj havis Pola Radio (1 095 dum 547,30 horoj) kaj Radio Pekino (444 elsendoj dum 222 horoj). Sekvas Portugalio, Svislando, Aŭstrio kaj Vatikano. En 1978 okazis 2 788 programoj dum 1 018 horoj.

Kibernetiko

- Laŭ propono de prof. d-ro Helmar Frank (FR Germanio) kaj subteno de du aliaj funkciuloj de Internacia Asocio pri Kibernetiko, tiu organizaĵo utiligos Esperanton kiel plenrajtan laborlingvon (apud la angla kaj la franca) dum sia 9a Internacia Kongreso pri Kibernetiko en Namur (Belgio), inter la 8a kaj 13a de septembro ĉi-jare. Prelegproponoj pri ĝenerala kibernetiko, biokibernetiko, kibernetikaj maŝinoj, kibernetiko en la



- Venezuelo:** La 14an de decembro 1979, en Caracas, Venezuela Esperanto-Asocio bankede festis la 120an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. La ĉefparolanto tie estis d-ro Ramón Guillermo Aveledo (meze sur la foto), privata sekretario de la Prezidento de Venezuelo. Estis unuafoje, ke altranĝa funkciulo registara ĉeestis Esperanto-kunvenon en Venezuelo. Dekstre de la honora gasto sidas prof. J.E. Bachrich, maldekstre prof. J. Mosonyi.

instruado ktp. estas bonvenaj ĉe la nova adreso de prof. Frank (Kleinenberger Weg 16A, D-4790 Paderborn, FR Germanio). En la kadro de la kongreso okazos aparta simpozio pri lingvokibernetiko.

Universitatoj

- En la Katolika Universitato Fu-jen en Tajpeo (Tajvano) pasintjare la Internacian Lingvon lernis pli ol 200 studentoj. Instruis prof. d-ro Johano B. Kao, kiu ĵus aperigis la unuan el la tri volumoj de siaj artikoloj en la angla, Esperanto kaj la ĉina. Pastro Kao pasintjare rezignis pri la posteno de fakultatestro en la Universitato Fu-jen,

kie li ankoraŭ profesoras kaj daŭrigas ankaŭ la instruadon de Esperanto.

Faka literaturo

- Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj (SRES, poŝtfako 193, H-1368 Budapest, Hungario) anoncis tradukkonkurson pri esperantigo de hungaraj sciencaj tekstoj. Detaloj aperis en *Budapeŝta informilo*, novembro 1979, p.10. SRES instigas ankaŭ alilandajn grupojn de simila orientiĝo fari samspecajn iniciatojn. Krome, la Rondo alvokas ĉiulandajn tradukantojn de la faka literaturo sendi siajn tradukojn al Budapeŝto, kie oni planas katalogi, peri al interesitoj kaj eventuale eldoni tiujn sciencaĵojn.

kaj patrolando de B. Ziherl kaj gvidis multajn E-kursojn, i.a. en la nazia koncentrejo Dachau.

OTTO C. LANGE (1898-1979) forpasis la 7an de decembro en Kopenhago. Li lernis la Internacian Lingvon en 1924, dum multaj jaroj prezidis la lokan E-klubon en Odense, estis 17 jarojn estrarano kaj 8 jarojn prezidanto de la antaŭa Centra Dana Esperantista Ligo, kies honora membro li fariĝis en 1958. Dum pli ol kvarona jarcento Lange estis komitatano de UEA, partoprenis en multaj Universalaj Kongresoj, jarojn longe membris en UEA kiel subtenanto, funkciis kiel delegito kaj fakdelegito. En Danlando Lange estas konsiderata unu el la plej meritplenaj aktivintoj en la landa E-movado.

LEOPOLD MOKER (1902-1979) mortis en akcidento en Subotica (Jugoslavio) la 10an de novembro. Li estis konata aktivulo precipe en la laborista E-movado. Moker lernis la lingvon en 1925, gvidis multajn kursojn, verkis 10-kajeran lernolibron *Esperanta kurso* kaj kunlaboris en Esperanto-periodaĵoj.

Nekrologoj

RUT CARLÉN (1926-1979), edzino de la honora membro de UEA, s-ro Erik Carlén, antaŭa vicprezidanto de la Asocio, mortis en Hällabrottet (Svedio) la 24an de decembro. Ŝi

anto, tradukanto, kunlaboranto de jugoslaviaj E-periodaĵoj. Inter liaj tradukoj elstaras *Martin Krpan* de F. Levstik. Kozlevčar verkis historion de la loka E-movado, kompilis la internacian legolibron *De oriento al okcidento*, tradukis *Komunismo*



lernis Esperanton en sia junaĝo kaj energie subtenis ĝin. Kiel kutime okazas, multo el la movadaj meritoj atribuitaj al s-ro Carlén apartenas almenaŭ duone ankaŭ al la forpasinta s-ino Carlén, kiu al sia edzo ebligis aktivi en la Movado. Ŝi estis tre ofta gasto en la Universalaj Kongresoj.

JOŽE KOZLEVČAR (1900-1980) mortis en Ljubljana (Jugoslavio) la 4an de januaro. Kozlevčar lernis Esperanton en 1921, estis i.a. vicprezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, prezidanto de Slovenia E-Ligo, komitatano de UEA, animanto de E-Instituto en Ljubljana, kursgvid-

Oficiala informilo

N-ro 532

ĈEFDELEGITECO VAKAS EN BRITIO

Vakas la ofico de Ĉefdelegito de UEA por Britio, post eksigo de Grahame Leon-Smith, kies aliaj okupoj ne plu permesas al li prizorgi tiun taskon. Pri delegitaj aferoj oni turnu sin provizore al Brita Esperanto-Asocio, kiu jam funkcias kiel kotizperanto.

KOTIZPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Ŝanĝiĝis la adreso por pago de UEA-kotizoj. Anstataŭ al la adreso de la ĉefdelegito s-ro L. Rýznar, la membroj en Ĉeĥio bv. estonte pagi al la adreso de ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Por Slovakio informoj sekvos.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilio: Antonio Rodrigues da Silva; Georg Otto Vaske. Japanio: K. Fido. Svislando: J. Thum.

SOCIETO ZAMENHOF

AŬSTRAL: 34 Margaret Chaldecott; 35 Leslie V. Scott. BELG: 36 Gustaaf Goossens; 37 E.L.M. Wensing. FR GERM: 38 Hertha Franck; 39 Julie Winter. NED: 40 H. Veenstra; 41 G.H.M. Wulfers-Meddens; 42 C. B. Zondervan. SVED: 43 Maja Ahlström; 44 Gunnar Börjesson; 45 Leif Holmlund; 46 Gustav Nygård. US: 47 R. Kent Jones; 48 Catherine L. Schulze; 49 William R. Schulze. AŬSTRAL: 50 Ralph L. Harry. BELG: 51 Germain Pirlot; 52 Germaine Wolff. BRAZ: 53 Alvaro Rabélo. DANL: 54 Johannes B. Pedersen. FINNL: 55 Irma E. Heikkilä; 56 Vuokko Heinäsuo; 57 Irja Klemola; 58 Harri Laine; 59 Liisi Oterma; 60 Aarne Ratalahti; 61 Tuoko Tähtinen. FR GERM: 62 Marie Laade. HISP: 63 A. Enriquez de Salamanca. JAP: 64 Sin'itirô Kawamura; 65 Saburô Yamazoe. JUG: 66 Jožica Židanik. LUKS: 67 Brian R. Moon. NED: 68 H. Boersma-Hoekema; 69 G.B.J. Mantingh; 70

W.H. Mook; 71 C. Mook-v.d. Laan; 72 J.S. Rooke; 73 E.J. Woessink; 74 Akiko Woessink-Nagata. SVED: 75 Harald Andersson; 76 Martha Andreasson; 77 Ragnar Hjorth; 78 Elna Jansson; 79 Etel Johansson; 80 Tore Johansson; 81 Barbro Karlsson; 82 David Kullberg; 83 K.G.L. Lagerkrantz; 84 Bror Lindström; 85 Gurli Nylin; 86 Olle Olsson; 87 Elly Persson; 88 Olle Persson; 89 Folke Pettersson; 90 Eugen Rytenberg; 91 Sten Svenonius.

DONACOJ 1979 (Gld.) ĝis la 31a de decembro

CENTRO DE ESPLORO KAJ
DOKUMENTADO: Nederlando:
E. Burg 50,00. Sumo jara 103,80.
FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ
UNESKO: Nederlando: E. Burg
50,00. Sumo jara 1 355,45.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: E. Burg 25,00; J.J. Rooke 100,00; Nederlanda Esperanto-Asocio 300,00. Sumo jara 4 543,15.
FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: R. Petri 23,24. Nederlando: Tj. Boersma 54,75; E. Burg 50,00; J.S. Rooke 100,00. Svedio: D. Kullberg 27,50. Institucio Hodler: 2 000,00. Sumo jara 5 126,10.
FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Japanio: T. Huĝimoto 320,00. Sumo jara 352,00.
FONDAĴO OFICEJA ILARO: Esperanto en Komerco kaj Industrio 2 000,00. Sumo jara 14 145,56.
FONDAĴO TEJO: Nederlando: J.S. Rooke 100,00. Sumo jara 781,14.
ĜENERALA KASO: Belgio: S. De Weerd 33,80. Nederlando: E. Burg 24,90; J.Th. de Goeij

200,00; H. Veenstra 700,00; Y. Weidema 18,00; S.A.K. van der Zee 300,00; Anonime 2 003,70. Hispanio: E. de Salamanca Lorente 28,80. Usono: H. Tonkin 26,68. Diversaj malgrandaj 29,05. Sumo jara 10 196,11.
PATRONOJ DE TEJO 1980: 8 G. Becker, FR Germanio. 9 M.A. Altuna Aspiazu, Hispanio. 10 S. Martina, Italio. 11 A. Eder, FR Germanio.
PROPAGANDA KONTO: Jugoslavio: J. Židanik 47,06. Sumo jara 573,97.

Al ĉiuj tre koran dankon, ĉar: dum la jaro 1979 UEA enspezis preskaŭ 100 000,00 guldenojn el malavaraj donacoj kaj heredaĵoj. Sen tiu esenca apogo, sen tiu grandanimeco, la funkciado de la Asocio apenaŭ estas imagebla. Tial denove: DANKON!

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 32

(pri la demando vidu nian
januaran numeron)

a. Adamo Zamenhof (1888-1940) estis la unua filo de d-ro L.L. Zamenhof. Li studis la oftalmologion kaj doktoriĝis ĉe la universitato de Lausanne, Svislando. Lia edzino estis Wanda Frenkel, kies patro, Mendel Frenkel, frekventis la Duan Viran Gimnazion de Varsovio kune kun Ludoviko Zamenhof.

b. Sub la titolo *Sinjoro Tadeo aŭ lasta armita posedpreno en Litvo*, la epopeo de Adam Mickiewicz (1798-1855), estis elpoligita de Antoni Grabowski dum la unua mondmilito. *Sinjoro Tadeo* estis publikigita unuafoje en 1918. La dua eldono, kun ilustraĵoj, aperis en 1955, kaj samjare estis eldonita esperantlingva biografio pri Adam Mickiewicz fare de M. Jastrun.

c. La pola pionira esperantisto Adam Zakrzewski (1856-1921)

uzis ankaŭ la pseŭdonimon Z. Adam. En 1896 li publikigis sian propran planlingvan projekton, *Lingua International*. Post ĝia fiasko li reiris al Esperanto.

ĉ. Eŭgeno Lanti, aŭ simple Lanti, en 1921 fondis la organizaĵon Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). En 1976 SAT eldonis biografion de sia fondinto, *Vivo de Lanti*, verkitan de E. Borsboom. Kolekto de artikoloj de Lanti publikigita en 1977 havas kiel titolon *Adamaĵoj*.

d. Hendrik Adamson (1891-1946) kreis poezion spegulantan "malesperan rezignon, profetajn ektondrojn kaj amaran ironion". Post lia morto aperis en 1967 lia kolekto de versoj *Vesperkanto*.

e. *Adamo kaj Eva*, eldonita en 1954, estis verkita de Francisko Azorin (1885-1976). Laŭprofesie li estis arkitekto kaj li verkis seplingvan fakterminaron: *Universala terminologio de la arkitekturo* (1933).

REDAKCIA NOTO: En aprilo ĉijare "Ekzameno E" fariĝos 4-jara. Ĉu ĝi servas al sia origina celo esti instrua kaj interesa rubriko, precipe por Esperanto-grupoj? Alec Venture foje aplaudis al la rubriko; iu anonimulo ĵus sendis preskaŭ blasfeman leteron pri ĝi. Kion vi opinias pri "Ekzameno E"? Antaŭdankon pro frazo tiutema.

f. La unua Esperanta eldono de *La tragedio de l' homo*, elhungarigita de Kolomano Kalocsay, aperis en 1924. Post kvar jardekoj, en 1965, estis publikigita la dua versio en Esperanto, kiun faris la sama tradukinto.
g. *Printempo en la Aŭtuno*, "rakonto pri dolĉe melankolia renkonto", de la hungara esperantisto Julio Baghy (1891-1967), priskribas la burĝonan amon inter la gejunuloj Adamo Rabecy kaj Eva. La verko estis eldonita en 1931 kaj fotorepresita en 1972.

DEMANDO 33

(la respondo aperos
en nia marta numero)

Unu el la plej elstaraj kontribuantoj al la disvolvo de la antikva romia kulturo estis viro, kiu mem ne kreis beletrajn ĉefverkojn, sed subtenis per materiaj rimedoj junajn poetojn kiel Vergilion, Horacion kaj Propercion. Temis pri Gaius Cilnius Maecenas (inter 74 kaj 64 a.K. — 8 p.K.), riĉa romia kavaliro. Li devenis el eminenta etruska familio, kaj fariĝis konfidenculo de la imperiestro Aŭgusto, kiu alte estimis la diplomatan lertecon de tiu granda patrono de la artoj.

Mecenaso, kiel li estas konata en Esperanto, havis imitantojn — mecenatojn — en aliaj lokoj kaj periodoj de la monda historio kaj ankaŭ en la Esperanto-movado. Ĉu

W.H.T. mortis en 1901. Lin koncernas la demando sub b.



vi povas identigi jenajn kvin mecenatojn de la frua epoko de Esperanto, kiuj per sia malavara financa apogo helpis la antaŭeniradon de la Movado kaj certigis ĝian kontinuecon kaj estontecon?

a. La unua mecenato de Esperanto estis posedanto de sapfabriko en Kovno (nuntempe Kaunas), Litovio. Li esperantistiĝis, kiam li jam estis maljunulo. Per lia helpo, la *Unua Libro* estis eldonita en 1887.

b. Okaze de la financa krizo, kiu trafis la unuan E-revuon, *La esperantisto*, en 1891, pro manko de sufiĉe da abonantoj, aperis sur la scenejo la dua mecenato. Li estis germana mineja termezuristo, kiu subvenciis la gazeton kaj sendis al Zamenhof monatan salajron por ties redakta laboro.

c. Kiam *Lingvo internacia*, la dua internacia gazeto en Esperanto, estis fondita en Uppsala, Svedio, en 1895, rusa kemiisto kaj direktoro de vinber-instituto apud Odeso kontribuis monon por tiu entrepreno, kaj

fariĝis ĉefredaktoro kaj financa direktoro de la periodaĵo.

ĉ. Post la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905, la Esperantista Centra Oficejo estis starigita en Parizo. La iniciato venis de generalo Sébert, kiu donis la unuan monsumon. Pli granda financa apogo venis de alia franca esperantisto, kiu havis la saman profesion kiel Zamenhof.

d. La filo de fama svisa pentristo lernis Esperanton en 1903, dum li ankoraŭ estis mezlernejo. Li decidis sian vivon al Esperanto, vivtenante sin per malgrandaj pagoj, kiujn li ricevis de sia patro. La juna viro heredis la postlasaĵon de la patro post ties morto, kaj li agis same, testamentante la heredaĵon al Universala Esperanto-Asocio.

Anoncetoj

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık sok. n-ro 23, Ortaköy-İstanbul, Turkio.

Letervespero en marto. Ĉiu sendinto ricevos respondon. Bonvolu sendi bildkartojn, leterojn ktp. Esperantista Centro F.O.L., 8 rue de la Mission, F-10 000 Troyes, Francio.

Senpagan ekzempleron de turisma revuo *La Migranto* petu de Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

35 plenaĝaj gelernantoj de fundamenta kaj supera kursoj de Esperanto (kun meza kaj supera edukiteco) deziras komenci reciprokan korespondadon. Korespondproponojn sendu al kursgvidanto: mgr Czesław Baranowski, ul. Chopina 21 a/4, PL-75-576 Koszalin, Pollando.

Poŝtmarkoj valoras oron: Ofte tra la pasinta jaro ni petis vin sendadi uzitajn poŝtmarkojn al UEA. Kiel grava tio montriĝis, pruvu al vi la informo, ke en 1979 UEA enkasigis 4 700 guldenojn el la poŝtmarkaj vendoj. Sub "Donacoj" (p.30) vi povas vidi, ke la tuta kapitalo de la Fondaĵo Azio-Afriko sumis eĉ malpli. Do, la poŝtmarkoj estas bonvenaj. Dankon!

Korespondantojn pri lokomotivoj, aŭtomobiloj kaj sporto serĉas: Aleksander Moskov, ul. P.R. Slavejkov 14, BG-7002 Ruse 2, Bulgario.

Bonvolu sendi bildkartsaluton al: Willem de Haan, Huis van Bewaring, Brink 9, 9401 HS Assen, Nederlando; kun kvin kolegoj en mallibero pro militrifuzo. Sinceran dankon. Marjo van Bentum.

En la nomo de Homaranismo mi postulas debaton. Vidu anoncojn en la numeroj de oktobro 1979 kaj januaro 1980. Revantes.

Korespondi tutmonde deziras 22-jara Nadia Kojevnikova, 11 m/r, d.4, kv.24, SU-404123 Volzskij, Soveta Unio.


16-jarulino deziras korespondi: Snežana Atanasovska, ul. 2ri Avgust br. 1A, YU-97000 Bitola, Jugoslavio.

UFE organizas karavanon al la UK en Stokholmo. Du eblecoj, ĉu trajne, ĉu aviadile. La flugkompanio Air France konsentis tre favorajn prezojn. Sciigoj al UFE, 4 bis Rue de la Cerisaie, F-75004 Parizo.

La modernigita ortografio (sen ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ; kun q, w, x, y) ebligas akceli la ĝeneralan tutmondan agnoskon, instruadon kaj uzadon de nia lingvo. Informas: O.E.O., 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse.


TARIFO: Ciu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

17-jara gimnaziano deziras korespondi (prefere kun knabinoj), por perfektigi sian lingvoscion: Ĝavad



Haĝiha, Meidan/Khalgr (Shah), Motaref Str., Nasirdivan Alley n-ro 15, Tehran 11, Irano.

Se ni estas dankemaj al tiuj kiuj multe batalas laborante por "nia afero", ni devas ne forgesi tiujn, kiuj donis eblecon al niaj batalantoj labori entuziasme kaj en plena libereco: inter tiuj ĉi sinjorino Giuseppina Salvucci vidvino Gabrielli, amata patrino de Lina Gabrielli.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1979, p. 68. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.30 Pekino, 41.00m (7315 kHz), 30.44m (9860kHz).I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 25.67m(11685 kHz), 19.81m(15145kHz). I.
15.30-16.00 Varsovio, 48,90m (6135 kHz), 31,45m (9540 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, 43.73m(6860 kHz), 31.98m(9380kHz).I.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995kHz), 49.22m(6095 kHz), 41.18m (7285kHz). I.P.

DIMANĈE

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.66m (15260 kHz), 13.90m (21575 kHz). I.P. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
17.20-17.30 Lisbono, 19.56m (15340 kHz), 16.78m (17880 kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, P-1200 Lisboa 1, Portugalio.
18.20-18.30 Lisbono, 49.79m. (6025 kHz), 30.80m (9740 kHz). Kiel je 17.20.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64. (11700 kHz), 19.84m (15120kHz). I.P. Radio vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 17.20.
23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m (1400kHz). P. Brazila Spiritisma Fe-

deracio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Braz.
01.20-01.30 Lisbono, 31.14m (9635 kHz), 25.34m (11840kHz).
02.50-03.00 Lisbono, 25.26m (11875 kHz).
03.20-03.30 kaj 05.20-05.30 Lisbono, 49.79m (6025kHz), 25.14m (11935kHz), kiel dimanĉe.
18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15. Svislando.
22.00-22.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.83m (15125 kHz), 16.89m (17760 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.90m (21585 kHz).P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz).P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

ĴAŬDE

06.15-06.30 Vatikano, 196m(1530 kHz), 48.47m(6190kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31,10m (9645 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.
17.50-17.55 Vieno, 89.8 MHz (mod. frekv.). I. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.00-22.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Viaj leteroj al la redakcioj de la Esperantaj radio-elsendoj estas la sola signo pri ilia populareco.

VENDREDE

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz).P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

SABATE

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m(9770kHz), 19.28m (15560kHz). I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.00-22.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedaŭraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

a) Direktitaj ondoj. **Berno**: 15125, 17760, 17830 kaj 21585 kHz al Afriko; 21585 kHz al Suda Ameriko 3985, 6165 kaj 9535 kHz al Eŭropo. **Lisbono**: 15340 kaj 17880 kHz al Afriko; 9635 kaj 11840 kHz al Brazilo; 6025 kaj 11935 kHz al Norda Ameriko; 11875 kHz al Suda Ameriko; 6025 kaj 9740 kHz al Eŭropo. **Pekino**: 7315 kaj 9860kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15145kHz al Sudorienta Azio; 6860 kaj 9380 kHz al Eŭropo. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6190, 9645, 11740 kHz al Ameriko; 6190, 7250, 9625, 9645 kaj 11715 al Eŭropo. **Vieno**: 6155, 9770 kHz al Eŭropo; 15260kHz al Nordorienta Ameriko; 15560kHz al Proksima Oriento; 21575kHz al Aŭstralio kaj Azio.
b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: **Romo**, **Varsovio**, **Vatikano** (1530 kHz).

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro**, **Sabadell**, **Sorocaba**, **Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modula frekvenco (M.F.).

ABZ de amo estas havinda popularsciencia verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledimita plasto. ISBN 87 87089 09 2.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj. Por samtempa mendo de minimume 3 ekz., UEA donas 33-procentan rabaton.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

fama sudamerika romano en la traduko de F. de Diego. Caracas: VEA, 1975. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld.

UEA estas nun la ĉefdistribuanto de la Esperanta eldono.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo kaj riĉigis nian lingvon per libro kies ĝuado en Esperanto ne estas sub tiu de la legado en la hispanlingva originalo. Kelkloke la estetika ĝuo estas pli diafana kaj senpera en la tradukita teksto, ol en la originala, dank' al la bravura manipulado de la latentajoj en Esperanto kaj al la suverena agordado de ĉi ties esprimrimedoj." Juan Régulo

LA LASTAN INTERVJUON
KUN KALOCSAY legu unike
en la ĵusa numero de

Monda Karuselo

Abono (4 numeroj) kosta £1.20 brita aŭ egalvaloro. Mendu ĉe Mollison, 6 Rosemarkie Cres., Broughty Ferry, Dundee, Skotlando, DD5 2RQ; pĉk. 19 995 0008.

Du belaj libroj



Heinrich Böll



**La perdita
honoro de
iu Katarino
Blum'**

Bleicher Verlag riĉigas la movadan libromerkaton per du belaj, profesie faritaj volumoj, el la plumo de literaturaj revoluciulo kaj nobelpremiito:

TRIGROŜA ROMANO (1934), Bertolt Brecht (1898-1956). El la germana trad. Karl Schulze. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1977. 374p. 19cm. ISBN 3-921097-34-7. Prezo: 24,00 guldenoj.

LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM', (1974), Heinrich Böll (1917 -). El la germana tradukis Rikardo Ŝulco. Gerlingen: Bleicher Verlag, 1978. 154p. 19cm. ISBN 3-88350-500-5. Prezo: 16,00 guldenoj.

La Libroservo de UEA donas rabaton de 33% ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.



DE LA 3a ĜIS LA 7a DE APRILO
1980 EN LA NORD-ORIENTA
ITALIO

PETU INFORMOJN KAJ ALIĜOJN
ĈE:

ITALA ESPERANTO-JUNULARO
CASELLA POSTALE 210
I-56100 PISA, ITALIO

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Ĵus — kaj fine, post dujara atendado — aperis ĉi tiu scienca analizo de la fenomeno de la Internacia Lingvo Esperanto. Ampleksa enkonduko ■ Fonetiko ■ Morfologio ■ Sintakso ■ Leksiko kaj semantiko ■ Fonetikaj simboloj ■ Bibliografio (88 eroj) ■ Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld. (Ned. plus 4%)

JAM APERIS ANKAŬ LA FEBRUARA,
DO, LA DUA NUMERO DE

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO

Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4 — riĉe ilustrita

11 kajeroj jare

Jara abono: 49,50 gmk aŭ 800,- b.fr.

La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2100 Schoten. Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO", petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

Pensu pri beleco


de viaj korespondadoj kaj uzu la belan glumarkon de la 65a UK en Stokholmo. Kiel kutime, ĝi estas trikolora, sed escepte alloga ĉi-jare. Cent glumarkoj kostas 8,25 (por Nederlando 9,60) guldenojn, kio inkluzivas la sendokostojn. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroliveranto.



Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

La plej simpla kaj — konsiderante ĉion — la plej malmultekosta maniero atingi tion estas anonci en nia revuo. Memoru, ke la revuon legas minimume 13 000 homoj en 86 landoj tra la tuta mondo. Vidu nian anonctarifon sur la dua kovrila paĝo.

Ĉu vi valoras la libron?



Du mil homoj jam aĉetis la libron, ĉar... "Ĝis plibonigenda reeldono aŭ apero de Enciklopedio, ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." M. Duc Goninaz

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indkso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.